

EL POPOLA ĈINIO

中國報道 1979 9





Por Solidareco kaj Progreso

Ĝoja kunveno ĉe Kunming-lago



Ĉinio estas lando de multaj naciecoj. La naci-
malplimultoj loĝas plejparte en la provincoj kaj
aŭtonomaj regionoj ĉe la landlimoj de nia pa-
trolando. Lastatempe la Komisiono de Naciecaj
Aferoj de Ĉinio aranĝis vizitadon de diversnacie-
caj delegitoj al diversaj lokoj de la lando por
plifortigi la amikecon kaj solidarecon inter la
naciecoj kaj interŝanĝi inter ili spertojn pri pro-
duktado kaj konstruado.

La 560 delegitoj el 54 naciecoj venis de 22 pro-
vincoj kaj aŭtonomaj regionoj. Ili vizitis respektive
urbojn kaj kamparajn komunumojn dum pli
ol unu monato en Beijing, Shaanxi, Sichuan,
Guizhou, Heilongjiang, Jilin, Liaoning, Jiangxi,
Hunan kaj Hubei.

La delegitoj estis varme bonvenigitaj kaj akcep-
titaj de la popolanoj en ĉiuj lokoj.



Naciecaj delegitoj en Beijing



Vizito al miaŭ-nacieca vilaĝo

Gauŝan-aj delegitoj lernas dan-
con kun bambua buŝ-harmoniko.






En horloĝofabriko



Ekskurso sur Changjiang (Jangzi-rivero)





En anasbredejo de popola komunumo



(Supre dekstre) En budhisma templo en Xi'an



Miaŭa, bujiaj kaj tibetana delegitoj




Intima interbabilo inter koreanino kaj ujurino





En la Memordomo pri la Gvidado de Prezidanto Mao en Yan'an al la Ĉina Revolucio



Vizito al Hongyancun, kie troviĝas la domo en kiu laboradis kamarado Zhou Enlai dum sia batalado kontraŭ Kuomintango kiel reprezentanto de la Komunista Partio de Ĉinio dum la periodo 1938 — 1946.

Notado pri siaj impresoj kaj pensoj post vizitado





La gefratoj Tan Lianying (dekstre), Tan Yiwen (maldekstre) kaj Tan Meiyong

Tri Amatoroj de Kaligrafio kaj Pentrarto

Suzhou famiĝis de antikveco tra la mondo per siaj belaj ĝardenoj kaj en ĝi loĝis multaj poetoj kaj pentristoj. Nia fotisto lastatempe fotis kaligrafian kaj pentran aktivadon de tri gefratoj, kies familio estas unu el la multaj kaligrafaj kaj pentristaj familioj de tiu loko.

La pli aĝa fratino Tan Lianying estas 27-jara. Ŝi amas kaligrafion kaj pentrarton de sia infana aĝo. Nun ŝi laboras en la pentra grupo de la Fabriko de Popolaj Metiartaĵoj. Ŝi lertas en delikata pentrado kaj ŝiaj pentraĵoj vendiĝis en kaj ekster Ĉinio. La pli juna frato Tan Yiwen aĝas 22 jarojn. Li estas fame konata en Suzhou pro siaj kaligrafiaĵoj, kiuj ornamas iujn hotelojn, magazenojn kaj monumentojn. Li komencis kaligrafian ekzercon laŭ famaj kaligrafiaĵoj en sia ok-jara aĝo. Kiam li estis mezlernejano, ok el liaj kaligrafaj verkoj estis montritaj en Kaligrafia Ekspozicio de Suzhou. Nun li ofte prezentas kaligrafian arton al fremdlandaj gastoj kaj ricevis multajn laŭdojn de ili. Ilia pli juna fratino Tan Meiyong estas lernantino de duajara klaso de malsupera mezlernejo kaj kaligrafia maniulo. Ankaŭ ŝiaj kaligrafiaĵoj estas ekspozitaj en la lernejo aŭ donacitaj al fremdlandaj gastoj.

TAN LIANYING

Tan Lianying en pentrado

Pentrajo de Tan Lianying



TAN YIWEN






Tan Yiwen kaj kaligrafajo-garnistoj

Tan Yiwen en kaligrafia ekzercado

Kaligrafajo farita de Tan Yiwen



朝辭白帝彩雲間千里
江陵一日還兩岸猿聲
不住輕舟已過萬重山



TAN MEIYING

Tan Meiyong aŭskultas opiniojn de sia patro pri ŝia kaligrafajo.

Tan Meiyong kaj ŝiaj kunlernejanoj



EL POPOLA ĈINIO

中國報道

1979
N-ro 9
(252)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Ŝminkado de pekin-opera aktoro

La Pekin-opero de Ĉinio havas historion de pli ol 100 jaroj. Per troiga ŝminkado oni prezentas, sur la vizaĝo, diversajn tipajn trajtojn, kiuj spegulas insidemon, hipokritecon, stultecon, honestecon, saĝecon k. a. de personoj.

BILDOPAĜOJ

1. KOLORA SERIO
Por solidareco kaj progreso
2. NIGRA-BLANKA SERIO
Tri amatoroj de kaligrafio kaj pentrarto
3. KOLORA SERIO
Xiamen
4. NIGRA-BLANKA SERIO
La Riparejo de Antikvaj Objektoj de la Imperiestra Palaco
5. KOLORAJ SERIOJ
 - 1) Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de E-istoj
 - 2) Ĉinaj dancoj
 - 3) Perlo (Bildorakonto)

Enhavo

Salutvortoj al la 64-a UK de Esperanto fare de Zhang Qicheng, estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio	2
Atingoj de la ĉina ekonomio	3
Printempo de la ĉina literatura ĝardeno	5
La teatro, belarto kaj kino en Beijing	9
Vizito al verkisto Bakin	15
Malgranda heroino Nurgul	18
Bagateloj en la vivo	21
TRA ĈINIO: Xiamen	23
Scienco ne konas landlimon	25
Operacioj sub akupunktura anestezo	26
Revizito al Pekino	30
Eseo pri amikeco	31
AMIKECO: En la maro de amikeco	32
Giĉeto (Daŭrigo)	35
KURANTAJ AFEROJ	39
La cervo turnis sian kapon (poemo)	42
KALEJDOSKOPO: "Edeno de Birdoj"	43
Har-brodaĵoj	44
INTER NI: Nia abelbredado	45
Novaj Esperantaj libroj de Ĉinio	46

SALUTVORTOJ AL LA 64-A UK DE ESPERANTO

Fare de Zhang Qicheng, estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio

La 29-an de julio, 1979

Estimata sinjoro prezidanto,
Estimataj gesamideanoj,

Ni sentas grandan ĝojon, ke ni havas la ŝancon ĉeesti la 64-an Universalan Kongreson de Esperanto! Antaŭ ĉio, en la nomo de la Ĉina Esperanto-Delegacio, mi transdonas varmajn salutojn de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ĉinaj esperantistoj al vi, gesamideanoj el diversaj landoj, al la prezidanto de la Kongreso, al LKK kaj al niaj svisaj kelogoj kiuj afable nin gastigas.

En la lastaj jaroj la Esperanto-movado en nia lando pli progresis. Ĉijare fondiĝis Hubei Esperanto-Asocio, establiĝis Esperanto-grupoj kaj kursoj en Chengdu kaj aliaj lokoj, funkcias libertempaj Esperanto-kursoj en la Pekina Universitato kaj la Pekina Lingva Instituto. Ni plibonigis la gazeton "El Popola Ĉinio" kaj pliigos la horojn de nia Esperanta Disaŭdigo. Ni faris klopodojn kaj atingis certajn sukcesojn. Por ke nia laboro fariĝu pli fruktodona, ni sincere esperas, ke niaj amikoj senĝene elmetos opiniojn pri nia laboro, ĉu pri plivastigo de Esperanto, ĉu pri niaj Esperantaj eldonaĵoj, ĉu pri nia Esperanta Disaŭdigo. Ni kredas, ke dank' al la helpo de diverslandaj amikoj nia afero certe senĉese progresos.

Ni kore deziras sukceson al la Kongreso!

Dankon!

ATINGOJ DE LA ĈINA EKONOMIO

EN la lastaj pli ol du jaroj aperis ĝojinda situacio en la ĉina ekonomia konstruado, nevidita en la pasintaj pli ol dek jaroj.

Tiun ekonomian situacion konkrete klarigis la raporto de ĉefministro Hua Guofeng pri la registara laboro kaj la raporto de vicĉefministro Yu Qiuli pri projekto de la naciekonomia plano por 1979 en la Dua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso, okazigita en junio de 1979. Ili ankaŭ proklamis necesajn rimedojn por disvolvi la nacian ekonomion.

En 1978, kvankam iuj lokoj de nia lando suferis gravan sekegecon kaj aliajn naturajn katastrofojn, tamen riĉa rikolto en agrikulturo estis akirita. La totala produktovaloro de agrikulturo atingis 145,900,000,000 juanojn, t. e. 102.7% de la plano, kaj kreskis per 8.9% kompare kun tiu de la antaŭa jaro. En 1978 la grenokvanto meznombro por ĉiu loĝanto en la tuta lando superis la plej altan nivelon en la historio, kaj la totala produktokvanto de greno atingis 304,750,000 tunojn kun pliiĝo je 22,000,000 tunoj, t. e. 7.8%, kompare kun tiu de la antaŭa jaro; la produktokvanto de kotono atingis 2,167,000 tunojn kun pliiĝo je 5.8% kompare kun tiu de la antaŭa jaro; kaj la produktokvanto de oleo atingis 5,218,000 tunojn kun pliiĝo je 30% kompare kun tiu de la antaŭa jaro. En 1978, pliiĝis la produktokvantoj de greno, kotono, oleo, kanabo, silko, sukero, teo, tabako, legomoj, fruktoj, drogherboj kaj aliaj.

La totala produktovaloro de industrio en 1978 kreskis per 13.5% kompare kun tiu de 1977, kaj

la totala produktovaloro de tiu en 1977 kreskis per 14.3% kompare kun tiu de 1976. En la du jaroj 1978 kaj 1977, la produktokvanto de ŝtalo pliiĝis de 20,460,000 tunoj ĝis 31,780,000 tunoj, t. e. per 55.3%; la produktokvanto de karbo de 483,000,000 tunoj ĝis 618,000,000 tunoj, t. e. 28%; tiu de nafto de 87,000,000 tunoj ĝis 104,000,000 tunoj kun kresko per 19.5%; tiu de elektro de 203,000,000,000 kilovathoroj ĝis 256,000,000,000 kilovathoroj, t. e. 26%; tiu de kemia sterko (kalkulita laŭ la efika procento) de 5,240,000 tunoj ĝis 8,690,000 tunoj, t. e. 66%; kaj tiu de kemiaj fibroj de 146,000 tunoj ĝis 285,000 tunoj, t. e. 95%. Krome, la produktokvantoj de cemento, insekticido, kaŭĉuko, ekipaĵoj por minekspluatado, metalurgia kaj elektra industrioj, traktoroj, drapo, silkaĵo, sukero, papero, lesivo kaj aliaj multiĝis grandpaŝe. La kvalito de produktaĵoj iom pliboniĝis kaj la konsumitaj materialoj kaj la kosto de produktaĵoj iom reduktiĝis kompare kun tiuj de la antaŭa jaro.

Kaj la vivo de la popolo iom pliboniĝis. En la lastaj du jaroj, 60% de la laboristoj kaj oficistoj de la tuta lando ricevis altiĝon de salajro. La areo de loĝdomoj konstruitaj en 1978 atingis sume pli ol 37,000,000 kvadratajn metrojn kaj multiĝis je 33% kompare kun tiu de la antaŭa jaro. La meznombra enspezo de la tutlandaj kamparanoj ricevita de la kolektivo multiĝis je 17.7%.

En la lastaj du jaroj, la totala kvanto de la detale venditaj varoj kreskis je 16%, la totala kvanto de importoj kaj eksportoj kreskis je 53.7% kaj la financa enspezo kreskis je 44.4%. Scienco,

eduko, kulturo, higieno kaj aliaj aferoj ricevis pluapaŝan disvolviĝon.

La emfaza punkto de la naciekonomia plano por 1979, reviziita de la Ŝtata Konsilantaro, estas plirapidigi la disvolvon de agrikulturo kaj malpeza industrio, precipe tiu tekstila, pliigi la produktadon de karbo, petrolo, elektro, kaj konstruaj materialoj kaj la konstruadon de trafiko.

Por subteni agrikulturan produktadon, la ŝtato levos, ekde somero de 1979, la prezon de greno aĉetata de ĝi per 20% kaj la prezon de la ekstra kvanto da greno vendata al la ŝtato plie je 50% sur tiu bazo. Ankaŭ la prezoj de kotono, manĝoleo, porkoj kaj aliaj flankokupaj produktaĵoj vendataj al la ŝtato leviĝos konforme, el kiuj la prezo de 18 ĉefaj specoj de produktaĵoj leviĝos meznombro je 24.8%. La investo por agrikulturo en la totala investa sumo por la fundamenta konstruado en la ŝtata budĝeto leviĝos de 10.7% de la pasinta jaro ĝis 14%. Samtempe la ŝtato plifortigos la subtenon de industrio al agrikulturo kaj laŭkondiĉe kaj stabile disvolvos la meĥanizon de agrikulturo.

En 1979, la disvolviĝo de malpeza kaj tekstila industrioj estos iom pli rapidigita kun postulo ke la kvalito de la produktaĵoj estu plibonigita, la specoj de produktaĵoj plimultigitaj kaj pli multaj kaj bonaj produktaĵoj estu liverataj al enlanda merkato kaj eksportado. Kurantjare la ŝtato plimultigis la investon kaj eksterlandan valuton be-

zonatajn por la disvolviĝo de malpeza kaj tekstila industrioj.


Surbaze de disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo kaj leviĝo de produktivo, la vivo de la popolo devas esti iom post iom plibonigita. Pro leviĝo de la prezo de la agrikulturaj produktaĵoj aĉetotaj de la ŝtato, redukto aŭ nuligo de impostoj super agrikulturaj produktaĵoj kaj sur entreprenoj de komunumoj kaj brigadoj en iuj lokoj kaj disvolviĝo de agrikultura produktado, la enspezo de la komunumoj kaj brigadoj kaj la komunumanoj pliiĝos sume je ĉ. 13,000,000,000 juanoj. Samtempe kun tio, la ŝtato altigos la salajron de parto de la laboristoj kaj oficistoj, aplikos premian sistemon kaj havigos pli multe da laborŝancoj en la socio, tiel ke la enspezo de urbanoj kurantjare pliiĝos je pli ol 7,000,000,000 juanoj. La ŝtato konvene pliampleksigos la konstruadon de loĝejoj kaj publikaj servoj en la urboj.

1979 estas la unua jaro por turni la gravitan punkton de la tutlanda laboro en la socialisman modernigan konstruadon, kaj en ĝi celebriĝos la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. La Popola Kongreso alvokis, ke en la tuta lando tuj leviĝu movado de pliprodukto kaj ŝparo kun alta produktokvanto, bona kvalito, plimultaj specoj kaj malalta konsumo kiel la kerno, disvolviĝu la movado de amasa socialisma laborkonkurso kaj elmeto de raciigaj proponoj por garantii plenumon kaj superplenumon de la plano ĉijara.

La Ĉina Esperanto-Delegacio Partoprenis en la 64-a Universala Kongreso de Esperanto

La Ĉina Esperanto-Delegacio estrata de Zhang Qicheng, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ĉefa respondeculo de la Redakcio de El Popola Ĉinio, partoprenis en la 64-a U.K. okazinta de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto en la svisa urbo Lucerno. Inter la ses membroj de la delegacio troviĝas famkonata verkisto kaj tradukisto Ye Junjian (Cicio Mar). Tio estas la dua fojo, ke Ĉinio sendis delegitojn por ĉeesti U.K. en la lastaj pli ol dek jaroj. La delegacio alportis bondezirojn de la ĉinaj esperantistoj al la kongreso kaj la svisaj esperantistoj.

Printempo de la Ĉina Literatura Ĝardeno



LA UNUAJ LITERATURAJ FLOROJ

En marto de la kuranta jaro, kiam ĉarmis printempo kaj pompis floroj, okazis en Beijing (Pekino) la tutlanda kunveno por elekti kaj premi la plej bonajn novelojn de 1978. Oni nomis ilin la unuaj floroj printempon anoncantaj en la ĉina literatura ĝardeno. Tiu aktivado estis iniciatita de la redakcio de la gazeto "Popola Literatura" kaj iris inter la legantoj kaj profesiaj verkistoj tra la tuta lando. En mallonga tempo la redakcio ricevis pli ol 20,000 elektfoliojn, per kiuj legantoj voĉdonis por sia plej ŝatata verko. Maljuna verkisto Mao Dun funkciis kiel estro de la elekta komitato kaj fame konataj verkistoj Bakin, Xie Bingxin kaj aliaj estis ĝiaj membroj. Inter la 25 premiitoj troviĝas diversaj verkistoj, el kiuj la junaj konsistigis plejparton.

La verko de Liu Xinwu "Ĉefinstruisto" ricevis la unuagradan premion. La novelo malkaŝis detruadon faritan de la "kvarpersona bando" al la eduka afero kaj malbonajn influojn al lernantoj, kaj modlis figuron de mezlerneja instruisto, kiu kuraĝis kuraci la animan vundon de siaj instruistoj. La kortuŝa kaj viveca novelo "Sankta Misio" de alia juna verkisto priskribas veteranan policiston, kiu persistis pri justeco, renversis la eraran verdikton kaj oferis sian vivon. La novelo "Neagrable Bofrato" rakontas al la legantoj, ke iu intelekta junulo tutkore kulturadis bonrasajn semojn en kamparo kaj ricevis amon de junulino, kiu faris esploradon kune kun li, tamen li estis malestimata de iuj pro kalumnio fare de la "kvarpersona bando" al lia patrino en la kultura revolucio. La verkoj "Nia Armeestro", "Piedsignoj" k.a. kreis figurojn de maljunaj proletaraj revoluciuloj kaj ankaŭ ĝuis bonan akcepton de legantoj.


La aŭtoroj de tiuj 25 noveloj skribis, per sango kaj larmo, la amon kaj malamon de la popolo kaj aŭdigis la plej fortan voĉon de nia epoko, tial la verkoj povas tuŝi la plej senteman el la kordoj de la koro de la legantoj. Tiu elekta aktivado akcelos la kreadon de pli multaj kaj pli bonaj literaturaĵoj.

APERIS MULTAJ LITERATURAJ PERIODAĴOJ

En la lastaj du jaroj, aperis kaj reaperis en Ĉinio pli ol 100 literaturaj kaj artaj periodaĵoj. La plej okulfrapa el ili estas grandampleksa sinteza trimestra literatura gazeto "Nuna Epoko", kiu komencis aperi en julio ĉi-jare.

Tiu gazeto estas redaktata kaj eldonata de la Popola Literatura Eldonejo. Respondeculo de tiu gazeto diris, ke la eldonejo lastatempe ricevis pli kaj pli multe da verkoj kaj iuj el ili estas sufiĉe altnivelaj. La aŭtoroj esperas, ke iliaj kreaĵoj frue publikiĝos, kaj ankaŭ la legantoj deziras havi pli da novaj legaĵoj. Por kontentigi la deziron de la vasta legantaro oni fondis tiun gazeton.

Ĉiu numero de la nomita gazeto kun ĉ. 500.000 ideografiaĵoj aperigas en si novelojn, teatraĵojn, prozojn, eseojn, komentariojn ktp. Ĝi karakteriĝas per aperigo de kreaĵoj de novaj verkistoj,



La kunveno por elekti kaj premi bonajn novelojn

precipe de tiuj kiuj estas plenaj je intensa epoka spirito kaj spegulas la nuntempan vivon. Samtempe ĝi prezentas al la legantoj famajn eksterlandajn modernajn verkojn. En la unua numero ĝi aperigis i.a. la scenaron "Povo kaj Vero" de rumana verkisto Titus Popovici kaj la novelon

"Kampara Edzo" de usona romanisto John Cheever.

En la tempo kiam la "kvarpersona bando" tiranis, la tradukado, esplorado kaj komentado de fremdlandaj literaturaĵoj estis preskaŭ tute sufokitaj, eĉ la multe ŝatata gazeto "Monda Literatura" estis malpermesita dum 12 jaroj. La novaj numeroj de tiu reaperinta gazeto estas enhavoriĉaj, ili entenas novelojn, poemojn, teatraĵojn, turistajn notojn, prozojn, rememoraĵojn, kaj novaĵojn pri aktivadoj de literaturaj kaj artaj rondoj. Inter ili sin trovas "Notoj pri Vojaĝo" de hungara verkisto Sandoro Petofi, la itala romano "Tomboŝtono" kaj la franca fabelo "Malgranda Princo". Tiuj verkoj helpas legantojn plivastigi sian vidkampon, riĉigi sian scion kaj ĉerpi spiritan nutron. La literatura gazeto "Rikolto" redaktata ĉefe de Bakin reaperis en Shanghai, kaj la literatura periodaĵo "Oktobro" fondita de la Beijing-a Eldonejo jam prezentiĝis al la legantoj. Ili estas konkure aĉetataj tra la tuta Ĉinio.

DENOVE BRILAS LA FOLKLORA LITERATURO

La folklora literaturo de Ĉinio, enhavoriĉa kaj diverskolora, estas kultura riĉaĵo kreita de nia laboranta popolo dum la longa historio. Ĝi notis ĝojon kaj idealon de la popolo, kaj ankaŭ sangajn akuzojn de la subpremata klaso en la malnova Ĉinio. Ĝi havas profundan bazon en la amasoj kaj pro tio ĝi estas ŝatata de la vasta legantaro.

La gazeto "Folklora Literatura", kiu estis ĉesigita antaŭ pli ol dek jaroj, reaperis en januaro ĉi-jare. Post sia reapero ĝi publikigis novajn popolkantojn kaj aliajn elstarajn folklorajn literatura-



Mao Dun (la dua de maldekstre) faras paroladon en la kunveno.



jojn, inkluzive de epopeoj, eposoj, kantoj, mitoj, fabeloj kaj fabloj. Samtempe ĝi aperigis eksterlandajn folklorajojn. En ĝi oni metis ankaŭ nombron da amokantoj.

Krome eldoniĝis libroj de folkloro literaturo. Lastatempe nia Yunnan-provinco kun multaj nacimalplimulto reprenis nombron da folkloraj verkoj libroforme. La epopeo de ji-nacieco "Meige" estas bele ilustrita kaj represita. Ĝi rakontas al legantoj ŝanĝiĝon de la vivo kaj produktado de la ji-a popolo kaj ĝiajn morojn pri amindumado, geedziĝo, sepultado k.a. La ji-a popolo rigardas tiun epopeon kiel bazon kaj kantas ĝin tri tagojn

kaj tri noktojn dum la Printempa Festo kaj aliaj festoj. La kantistoj de "Meige" estas ekstreme respektataj. Alia eposo "Xian Xiu" de taj-nacieco, aperigita libroforme kun kovrilo de antikvaj desegnoj, prikantas amikecon kaj amon.

"Manas", epopeo de la ĥalĥaza nacieco de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, estas kompilata kaj eldonota en la ĥalĥaza lingvo.

POR LA INFANOJ

Ĉirkaŭ la Internacia Infana Tago, nia eldona branĉo eldonis pli ol 800 specojn de infanlegajoj.

Ĝajninto de la unuagrada premio juna verkisto Liu Xin-wu





Fame konata verkistino Xie Bingxin

Sub tutlanda kunlaboro oni kompilis kaj eldonis 29 bibliotekojn, ekzemple "Biblioteko de Elementlerneĵanoj", "Enciklopedio por Geknaboj", "Vortaro de Natura Scienco por Geknaboj", "Sciencaj Aktivadoj de Geknaboj", "Eksterlandaj Famkonataj Infanlegaĵoj", "Scienco kaj Tekniko de Eksterlandaj Geknaboj".

La nombro de verkistoj de la infana literaturo nun jam superis 1,000. Multaj maljunaj verkistoj skribis novajn verkojn por la infanoj. Famkonata verkistino Xie Bingxin publikigis sian verkon "Al la Malgrandaj Legantoj, vol. III" kaj nun estas verkanta la aŭtobiografian literaturaĵon "Mia Infaneco". La fama fabelisto Yan Wenjing, kiu ne uzis sian plumon jam pli ol dek jarojn, verkis 6 fabelojn por infanoj en la lasta duonjaro. Ankaŭ junaj verkistoj skribis, por la infanoj, multajn romanojn, rakontojn pri scienca fantazio, poemojn, fabelojn kaj aliajn.

Ye Junjian (Cicio Mar), fama verkisto, veterana esperantisto kaj tradukisto, la unua tradukis la plenan kolekton de la "Fabeloj de Andersen" por ĉinaj geknaboj. Liaj tri libroj "Elektitaj Fabeloj de Andersen", "Elektitaj Fabelaj Rakontoj de Andersen" kaj "Plena Kolekto de la Fabeloj de Andersen" estas jam denove eldonitaj. La unua libro kun eldonkvanto de miliono da ekzempleroj elvendiĝis tre rapide.

Verkita de **BIAN FANG**

LA TEATRO, KINO EN

LAO BAI

NOVA FIZIONOMIO DE LA TEATRO

Ĉiuvespere, kiam la antikva urbo Beijing baniĝas en ĉielruĝo, multaj plezure iras kun siaj gepatroj, edzino aŭ infanoj al teatroj, muzikaj salonoj aŭ aliaj amuzejoj.

Aŭskultu, ĉarma melodio ŝvebas en la muzika salono Zhongshan. Tie okazas Koncerto de Kantoj el Ĉinaj kaj Eksterlandaj Operoj aranĝita de la Centra Opera kaj Baleta Teatro. En tiu koncerto oni ludis kaj kantis pecojn el "La Traviata", "Eŭgeno Onegin" kaj la ĉina opero "Ayigul". Aplauĉoj aŭdiĝas tie de tempo al tempo.

Ĉina sopranistino Zhu Pengbo donas recitalon en alia muzika salono. Ŝi famiĝis pro prezentado de kantoj de Xi'er, heroino en la ĉina baletto "Blankhara Knabino". En la koncerto, ŝi prezentis ne nur ĉinajn popolkantojn kaj lirikaĵojn, sed ankaŭ famajn eksterlandajn kantojn en la angla, franca, japana, korea kaj hispana lingvoj. Ŝia prezentado ricevis varman aplauĉon de la aŭskultantoj.

En aliaj teatroj estas ludataj multaj tradiciaj pekin-operoj kaj aliaj lokaj operoj kaj modernaj baletoj. Kaj sabate, artaj vesperoj kun riĉa enhavo estas okazigitaj en la 6 ĉefaj parkoj de Beijing.

Aparte rimarkinda estas la teatra festivalo aranĝita de la Ministerio de Kulturaj Aferoj por celebri la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Tiu aktivado komencita en printempo aldonas brilon al la scenejoj de Beijing.

En la festivalo prezentiĝas dramoj, operoj, baletoj, pekin-operoj, muzikaĵoj, akrobataĵoj,

BELARTO KAJ BEIJING



pupteatraĵoj, lokaj operoj kaj ĉuji-aj* programe-
roj. La temoj de la prezentitaj programeroj estas
tre diversaj kaj iliaj enhavoj tre riĉaj. Iuj el la
dramoj prezentas la brilajn figurojn de ĉinaj
proletaj revoluciuloj de la unua generacio,
ekzemple en la dramoj “Yang Kaihui” (Yang
estis edzino de Mao Zedong, murdita de malami-
koj en 1930. Legu artikolon pri la dramo en n-ro
12 de 1977 de nia gazeto.), “Ĵurnaloknaboj”,
“Chen Yi Eliras el la Montaro” kaj “Aŭroro”
aperas la figuroj de Prezidanto Mao Zedong,
Ĉefministro Zhou Enlai, Prezidanto Zhu De kaj
Marŝaloj Chen Yi kaj He Long. Prezentiĝas
ankaŭ la dramoj “Ruĝa Koro” kaj “Por la
Patrolando”, kiuj kondamnas la persekutadon de
la “kvarpersona bando” al intelektuloj. Kaj
krome estas ankaŭ dramoj pri ĝojo en laboro kaj
riĉa rikolto, revoluciaj herooj, la feliĉa vivo de
la popolo kaj sincera amo inter gejunuloj.

Jen, sur la hele lumigita scenejo de la Kultura
Palaco de Naciecoj prezentiĝas tuĝja-a geedziĝa
ceremonio per la kantodanco “Geedziĝo”. La
hontema novelo, la feliĉa novelo, spritaj
gejunuloj kaj gastoj en belaj vestoj formis
ĝenron el densaj koloroj kaj fortaj strekoj.

Ridojn vekas la popola danco “Rigardado de
Lanternoj”, kiu prezentas ŝercadon de 8 amindaj
petoluletoj dum pririgardado de lanternoj en
festa punkto. Per sia eminenta arto la dancantoj
kondukas la spektantojn al maro de diversaj
lanternoj. Efektive sur la scenejo troviĝas nenia
dekoracio, tamen la aktoroj tre vivece kaj deli-
kate prezentas la sentojn de la knaboj dum
rigardado de lanternoj. Interalie, iu sceno pre-
zentas ok geknabojn kiuj rigardas kun ok dife-
rencaj ridmienoĵoj unu lanternon. Kaj dum iro de
la danco, la dancantoj donas 18 diversajn for-
mojn al la portataĵoj ĉapeloj por montri la ĝojon
de la knaboj. La spektantoj dankas, per tondraj
aplaŭdoj, la prezenton de la artistoj.

En la Ĉefurba Teatro, prezentiĝas la fama
dramo “Tetrikejo” verkita de la forpasinta
popola dramisto Laoshe, kies ĉefverko “Rikiŝisto
Xiangzi” estas tradukita en plurajn lingvojn. Per
pli ol 20 frekventantaj klientoj de iu tetrikejo
kaj kelkaj epizodoj, la dramisto prezentis la
ŝanĝojn en la socio dum 50 jaroj antaŭ la
Liberiĝo en tri malsamaj periodoj, nome la regado
de Qing-dinastio, la interbatalantaj militaristoj
kaj la kuomintangaj reakciuloj, kaj montris, ke

Tuĝja-a kantodanco
“Geedziĝo”





Sceno el "Por la Patrolando"

la malnova socio nepre pereos kaj nova luma socio nepre venos. Sen apliko de politikaj terminoj aŭ predikado per abstraktaj ideoj, tiu dramo sukcesis vekti koran malamon al la malnova socio kaj fortan amon al la nova Ĉinio.

Kaj krome, oni ludas ankaŭ la dramon "Vivo de Galilejo" de la germana dramisto Bertolt Brecht kaj la baleton "Cigna Lago" de P. I. Ĉajkovskij.

La nomita festivalo daŭros ĝis la fino de oktobro. Ĝis la fino de junio, oni jam faris pli ol 600 prezentojn kun totala spektantaro de pli ol 600,000 homoj. Dum la prezentado, pli ol 300 profesiaj kaj amatoraj komentariistoj faris komentojn en ligo kun la luditaj teatraĵoj pri diversaj problemoj koncerne al vigligo de literatura kaj arta kreado. Tia varma etoso nevideblis de multaj jaroj.

Respondeculo de la festivalo diris, ke la sperto en la lastaj 30 jaroj montris al ni, ke por vigligi literaturan kaj artan kreadon estas necese praktiki la principon "kune floru cent floroj kaj voĉojn donu cent skoloj". Li diris, ke inter la prezentataj programeroj troviĝas diversaj specoj de teatraĵoj kaj verkoj de diversaj skoloj. Tia aranĝo celas tion, ke la artistoj montru laŭeble siajn talentojn kaj progresu en la konkurso. Nur

tiamaniere nova situacio de disfloro de diversaj floroj aperos en la literatura kaj arta ĝardeno de nia lando.

EN LA BELARTA ĜARDENO

En frua somero, pli ol 20 diversaj belartaj ekspozicioj prenis lokon en la Belarta Ekspoziciejo de Beijing kaj aliaj ekspoziciejoj, ili ĉiutage akceptis dekmilojn da vizitantoj.

En la pitoreska Beihai-parko okazis pentraĵo-ekspozicioj de Zhang Ding kaj la Pentrarta Akademio de Beijing, en kiuj oni povas aĉeti por si verkojn de pli ol 30 pentristoj.

Zhang Ding estas rektoro de la Centra Metiarta Instituto. En la tridekaj jaroj, li akre malkaŝis la krimon de la kuomintangaj reakciaj regantoj kaj propagandis la Kontraŭjapanan Rezistmiliton per siaj karikaturoj. En la kvindekaj jaroj, kune kun veterana pentristoj Li Keran kaj Luo Ming, li spegulis la aktualan vivon per ĉinstilaj pentraĵoj kaj malfermis novan vojon de pentrarto. La pli ol cent ĉinstilaj pentraĵoj kaj karikaturoj ekspoziciitaj lastfoje estis plejparte verkitaj de li en la lastaj du jaroj. Interalie, la pentraĵo "La Dekmil-lia Rivero Changjiang" kun longeco de pli ol 5 metroj, spegulanta la majes-

tajn belaĵojn sur la bordoj de la riverego, altiris al si atenton de ĉiuj vizitantoj.

En la Belarta Ekspoziciejo de Beijing okazis samtempe ses ekspozicioj de ĉinstilaj pentraĵoj, olepentraĵoj, gravuraĵoj, animalaj pentraĵoj, modlaĵoj el farunpasto kaj argilaĵoj. Iuj el la montritaj verkoj estis faritaj de veteranaj artistoj dum aliaj estis de elstaraj novuloj.

La lignogravuraĵoj de la veterana lignogravuristo Huang Xinpo karakteriziĝas per fortaj strekoj, forta kontrasto de nigro kaj blanko kaj lakoneco kaj koncentriĝeco de komponado. La enhavo de liaj bildoj estas profunda kaj poezia.


En la pli ol 50 jaroj, olepentristo Yu Ben kreis ĉ. mil pentraĵojn. La figuroj prezentitaj en liaj verkoj karakteriziĝas per nefleksiĝemo kaj la ĉinaj pejzaĝoj pentritaj de li impresas per ĉarmeeco kaj sereneco.

La malgrandaj hundoj, katoj, kokoj kaj anasoj pentritaj de Han Meilin estas vivecaj, naivaj kaj agrablaj. Kelkajn pecojn de liaj verkoj ni jam prezentis en la 8-a numero de EPĈ.


Enirinte la ekspozicion de pentraĵoj de Wu Guanzhong, oni sentis sin kvazaŭ en kvieta

poezia medio de la naturo. Profesoro Wu, jam pli-ol-60-jara, laboras en la Centra Metiarta Instituto. Dum dekoj da jaroj de pentrado, li plene dediĉis sin al esplorado pri esprimo de la spirito de homfiguroj kaj poezio en pejzaĝoj kaj al naciigo de olepentrado kaj eltrovo de nova vojo por la ĉinstila pentrado, kaj en sia arta praktikado li formis sian originalan stilon. Inter la 120 olepentraĵoj kaj ĉinstilaj pentraĵoj lastafoje ekspoziciitaj, liaj verkoj "La Insuleto Gulangyu" kaj "Fiŝista Vilaĝo apud Lijiang-rivero" kondukas la rigardantojn en poezion, dank' al lia genia komponado kaj zorga kunarango de koloroj. Multaj aprecantoj laŭdis ke li lerte kombinis en siaj verkoj malsamajn teknikojn de la okcidenta moderna pentrado kaj la ĉina pentrado kaj prezentis orientajn sentimontojn per okcidentaj manieroj. Parolante pri siaj verkoj, li diris, ke li pentras la naturon kaj per oleaj kaj per akvarelaĵoj koloraĵoj, kaj per tio li volas krei novajn verkojn de la Oriento kaj la Okcidento en kombino.

Tre interesaj estas la pastaj homfiguroj kun versimilaj kaj plaĉaj formoj. La arto de modlado de pastaj figuroj jam havas historion de pli ol mil jaroj en Ĉinio. Ĝi estas speco de popola arto



"La Insuleto Gulangyu" pentrita de Wu Guanzhong



Reĝisoro kaj aktoroj de la "Gedziĝo per Fera Pafarko"

ŝatata de vastaj amasoj de nia lando. Pastaj modlaĵoj de ĉinaj artistoj estis plurfoje ekspoziciitaj eksterlande kaj prezentitaj al fremdlandaj amikoj kiel valoraj donacaĵoj. Inter la ĉifoje eksponitaj pastaj figuroj sin trovis herooj el la ĉinaj klasikaj romanoj "Buduara Songo" kaj "Ĉe la Akvorando", legendoj kaj operoj, kaj ankaŭ virinoj de ĉinaj nacimalplimulto kaj herooj el fremdlandaj literaturaj verkoj. Krome, oni ankaŭ modlis pastan figuron de Seiĝi Ozava, direktisto de la Bostona Simfonia Orkestro, kiu vivece prezentis la talentan muzikiston.

En la Kultura Palaco de Laboranta Popolo ekspoziciigis 360 pentraĵoj kaj skulptaĵoj elektitaj de la Federacio de Sindikatoj de Beijing el pli ol mil verkoj de belartaj amatoroj. En Jingshan-parko montriĝis verkoj de pli ol 70 pentristoj kaj kaligrafoj. Interalie troviĝis novaj verkoj de la pli-ol-okdek-jara fama pentristo Li Kuchan kaj la 15-jara kaligrafino Xiao Kejia. Kaj en Zhongshan-parko dekkelkaj junaj amatoroj de gravura arto ekspoziciis siajn verkojn.

Promenante en la artaj galerioj, mi estis forte impresita de la mirinda forto de arto, kiu riĉigis la kulturenan vivon de la popolo de Beijing.


EN KAJ EKSTER FILMOSTUDIOJ

Sur la planko de kabineto de la Sekreta Buroo de Kuomintango kuŝas tri homoj pafmortigitaj: la malamika spiona grupestro, kompartia perfidulo kaj Liu Xiaochen, laboranto de la sekreta buroo. Post urĝa kuracado, Liu Xiaochen reviviĝis. Sed la kuracisto-ekspertizisto opinias, ke la vundo de Liu povas esti kaŭzita de li mem aŭ de iu alia.

Kio Liu efektive estas? Kiu faris la pafojn? La nova malamika spiona grupestro eksuspektis Liu. Sed post diversaj provoj, Liu Xiaochen denove akiris konfidon kaj estis promociita sekretario de la grupestro. Dume, la aktivadaj planoj de la malamiko estis sinsekve fiaskigitaj. Kiam la malamika spiona grupestro konstatis, ke Liu Xiaochen estas komunista spiono enŝteliĝinta en la sekretan buroon kaj pafmortigis la du homojn,



"La Gepatroj kaj Ni" en fotado



Ekspozicio de Pentraĵoj de Wu Guanzhong

subite aŭdiĝis pafo kaj falis je tio la malamika spiona grupestro. La pafinto estas alia komunista spiono enŝteliĝinta en la sekretan buroon kaj laboranta kiel adjutanto de la grupestro. Tio estas la intrigo de la nova filmo "Pafoj en la Sekreta Buroo", nun ludata en multaj kinejoj de Beijing. Ĝi priskribas heroaĵojn de kompartiaj spionoj batalantaj en malamika organizo antaŭvespere de la Liberiĝo de Shanghai en 1949.

Krom enlande produktitaj filmoj, ankaŭ eksterlandaj filmoj estas ofte ludataj en Beijing-aj kinejoj. Inter ili troviĝas la jugoslavaj filmoj "Walter Defendas Sarajevon" kaj "Ponto", adaptaĵo de "Nia Damo de Parizo" de la fama franca verkisto V. Hugo, adaptaĵo de "Jane Eyre" de la brita verkistino Charlotte Bronte, usonaj filmoj "Transporto" kaj "La Estonta Mondo", la japanaj filmoj "La 8-a Bordelo de Sandakan" kaj "Ho Vi, Transiru la Indignan Riveron!" kaj la filmoj "Moderna Tempo" kaj "Kalklumoj" de la artisto-majstro C. Chaplin. Tiuj filmoj estas varme akceptataj, precipe la filmoj de C. Chap-

Pastaj figuroj de feoj el ĉina mito



lin, kiujn la ĉinaj junuloj ne vidis antaŭe, forte interesis ilin.

Kiam mi venis en la Beijing-an Filmstudion, ĝiaj sep filmigaj grupoj estis laborantaj samtempe. Iuj el ili iris al fabrikoj kaj vilaĝoj por fotadi eksterdomajn scenojn. La administranto de la produktado diris al mi, ke la tuta studio estas en energia laboro. Inter la farataj filmoj sin trovas biografia filmo “Li Siguang” pri la nomita fama ĉina geologo (aparta artikolo pri li aperis en n-ro 7, 1978, de EPC), la rakontofilmulo “Inter Salikoj kaj Floroj” pri vivo kaj batalo de kadroj kaj membroj de ĉinaj kamparaj popolkomunumoj, “Geedziĝo” kaj la mitologia filmulo “Zhongyi kaj la Blanka Draketo”.

Aŭdiĝis hasta muziko de gongo kaj tamburo en la vasta fotada halo kaj aperis juna bravulino en antikvaj batalkostumoj, kun lanco en la mano, kiu persekutis la malamikojn fuĝantajn en paniko. Tie oni estis filmantaj la operon “Geedziĝo per Fera Pafarko”. Tiu filmulo temas pri interesa amhistorio de brava knabino Chen Xiuying de Ming-dinastio (1368—1644 p. K.). La ĉ. 60-jara reĝisoro Chen Huaikai diris, ke tiu vaste cirkulanta rakonto ne nur montris la fidelan amon de Chen Xiuying sed ankaŭ la heroecon de ĉinaj antikvaj virinoj en batalado. Fama aktorino de pekin-opero Guan Sushuang ludis la rolon de Chen Xiuying. Ŝi havas diversflankajn talentojn kaj kreis sian originalan stilon en arto. Ŝi jam estas 51-jara kaj nun devas ludi la rolojn de enamiĝanta knabino, brava militistino kaj komandantino. Ordinaraĵ pekin-operaj aktorinoj ne kapablas ludi samtempe tiujn tri

malsamajn rolojn, kaj en la nomita opero montrigis la eminenta arto de Guan.

Kaj la nomita filmstudio tre multe atentis pri kulturado de junaj laborantoj de kino-arto kaj laŭeble kreas kondiĉojn por havigi al ili sufiĉajn praktikajn ŝancojn. Iuvespere, mi iris al Xinhua-librejo sur movoplena strato de Beijing, laŭ invito de la juna reĝisoro de la filmfara grupo de “La Gepatroj kaj Ni”, por rigardi ilian praktikan fotadon. Tiu estas komedia filmulo kun forta vivetoso. Per priskribo pri la vivo de iu laborista familio, la filmulo spegulas la gajan laboradon de la ĉina popolo. Per solvado de serio da ridindaj kontraŭdiroj, la filmulo diras al la junuloj kiel trakti sian profesion laboron kaj kiel ĝuste trakti la problemon de amo kaj geedziĝo.

La scenara aŭtoro de tiu filmulo Lin Li estas juna laboristo. Li diris, ke estas la bolanta vivo, kiu stimulis lin ekverki. Ankaŭ la reĝisoroj kaj la fotistoj estas artistoj kun aĝo de tridek-kelkaj jaroj. La vicreĝisoro Du Min diris, ke escepte de malmultaj roloj luditaj de veteranoj, ĉiuj roloj estis luditaj de junaj aktoroj. Ili estas viveplenaj kaj nekatentitaj de rutinaĵoj. Por garantii la kvaliton de la filmulo, du spertaj reĝisoroj estas komisiitaj labori kiel iliaj konsilantoj.

Sur la ekranoj de la kinejoj de nia ĉefurbo baldaŭ aperos ankoraŭ pli multaj kaj pli bonaj filmuloj.

* Popolaj artoformoj de Ĉinio inkluzive de kantrakontado, rakontado, humura dialogo ktp.





Bakin

DE longe mi havis deziron viziti Bakin pro tio, ke li estas ne nur fama ĉina verkisto, sed ankaŭ malnova esperantisto.

Iutage de aprilo ĉijare, Bakin venis de Shanghai al Beijing. Informiĝinte, ke li vizitos, post kelkaj tagoj, Francion kun delegacio de ĉinaj verkistoj sub sia gvido, mi speciale iris en la hotelon por intervjui lin antaŭ lia ekveturo. Mi neniam vidis Bakin, tamen liaj verkoj profunde interesis min jam antaŭ dekoj da jaroj, kaj poste mi pli bone konis lin leginte iujn artikolojn pri li. Mi renkontis lin en koridoro de la hotelo, kaj je la unua vido mi rekonis tiun maljunan verkiston kun arĝentaj haroj. Kun rideto sur la vizaĝo kaj vigla spirito li aspektis ne tiel maljuna kiel 75-jara aĝulo. Li kondukis min en negrandan gastoĉambron, kaj ni ekbabiladis intime.

Bakin estas vicprezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj kaj la Asocio de

LAO BAI:

Vizito al Verkisto Bakin

Ĉinaj Verkistoj, kaj membro de la Konstanta Komitato de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso. Dum la pasinta duono de jarcento li okupiĝis pri literatura verkado, kaj liaj verkoj ricevis altan takson de granda amaso de legantoj en kaj ekster nia lando. En la pli ol 20 jaroj de 1927, kiam li komencis verki sian unuan romanon "Pereo" en la kvina etaĝo de iu malnova apartamento en Parizo, ĝis 1948 li skribis verkojn de milionoj da han-aj ideografiaĵoj, kiuj spegulis la mizeran vivon de la tiama ĉina popolo kaj malkovris diversajn kontraŭdirojn de la malnova socio. Li skribis en iu artikolo: "Mi tutkore strebis al lumo, sed en la malnova socio mi vidis ĉie nur mallumon. Mi aŭdigis mian apelaciadon kontraŭ la mortanta reĝimo per miaj romanoj." Lia ĉefverko estas romano "Familio", verkita en 1932. Ĝi vivece priskribas la subpremadojn al la junula generacio sub la malnova reĝimo kaj ilian rezistadon kaj donis grandan influon al la legantoj.



Poste la romano estis adaptita al teatraĵo kaj filmo kaj hodiaŭ ankoraŭ havas grandan nombron da legantoj kaj spektatoroj.

Post la Liberiĝo en 1949, tiu ĉi serioza kaj diligenta verkisto eliris el sia kabineto kaj ofte profundigis en fabrikojn, kamparon kaj armeojn por koni la novan socion kaj novajn homojn. Tiam li ĉiujare prezentis al la legantoj unu aŭ du kolektojn de verkoj. En tiuj verkoj novaj epoko, homoj kaj anima fizionomio anstataŭis la melankolion, suferojn kaj ĉagrenojn priskribitajn de Bakin en la pasintaj romanoj.

En 1958, la Popola Literatura Eldonejo eldonis 14 volumojn de la “Kolekto de Verkoj de Bakin”, kiuj estis kompilitaj de li mem kaj entenas ĉiujn liajn verkojn skribitajn antaŭ la Liberiĝo. I. a. la mez-longa romano “Aŭtuno en Printempo” per priskribado de malfeliĉa amo atakis la familian diktatorecon en la malnova Ĉinio, malliberan geedzecon, katenadon de tradiciaj konceptoj kaj malracian socisistemon. La titolo de la romano estas donita sub la inspiro de la Esperanta novelo “Printempo en la Aŭtuno” verkita de Julio Baghy. Kiam Bakin finis sian verkon, li ankoraŭ ne elpensis ĝian titolon. Tiam la novelo

“Printempo en la Aŭtuno” tradukita de li estis ĵus finaperigita en monata gazeto “Mezlerneĵano” kaj eldonota baldaŭ kiel broŝuro. Li tralegis sian tradukaĵon ankoraŭfoje kaj subite nova ideo venis en lian kapon, kaj li tuj donis al sia verko titolon “Aŭtuno en Printempo”. Poste tiuj du verkoj estis eldonataj kaj distribuataj samtempe. Ankaŭ la kovrila projekto kaj ilustraĵoj de “Aŭtuno en Printempo” estis ellaboritaj laŭ tiuj de la novelo “Printempo en la Aŭtuno”.

Bakin estas malnova abonanto de nia gazeto. Ĉiufoje, kiam li ricevis novan numeron li foliumis ĝin. En la renkontiĝo li ĝoje rakontis al mi, kiel li eklernis Esperanton.

En 1921, li estis lernanta en iu mezlernejo de sia hejmloko. Foje, li legis en la gazeto “Nova Junularo” artikolojn disputantajn pri Esperanto, kiuj vekis ĉe li grandan intereson. Kaj li verkis artikolon por la revuo «Duonmonato» redaktita de studentoj, en kiu li esprimis sian aprobon al Esperanto. Sed tiam li ankoraŭ ne povosciis Esperanton. Ĝuste en tiu jaro li konatiĝis kun iu korea Esperanta studento kaj kun granda intereso eklernis de li Esperanton. En la jaroj 1924-1925 li daŭrigis sian lernadon de Esperanto kaj fine povis lerte uzi ĝin. En 1927, kiam li studis en

Francio, pere de Esperanto li starigis amikecon kun iu germana esperantisto. En la sekvanta jaro li revenis al la patrolando, kaj helpate de sia bona amiko, ĉina esperantisto A.A. Sofio, li loĝis en la Shanghai-a Esperanto-Asocio. Komence li helpis la organon "Verda Lumo" de la nomata asocio en ekzamenado de artikoloj. Kaj poste li partoprenis en la redaktado de tiu organo. Ĝuste en tiu tempo li verkis "Esperanto kaj Literaturo" kaj aliajn artikolojn. Poste li verkis per Esperanto "En Mallumo", "Gefratoj" ktp. Krom "Printempo en la Aŭtuno", li tradukis en la ĉinan lingvon ankaŭ Esperantajn librojn "La Floro de la Pasinto", "La Morto de Danton" k.a.

Kun granda plezuro Bakin ankaŭ parolis al mi pri la Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj Amikoj de EPC kun s-ro Tokuda Rokuro kiel ĝia estro, kiu vizitis lin en Shanghai en la pasinta jaro. La renkontiĝo kun la japanaj esperantistoj ege ĝojigis lin. Post sia reveno al Japanio s-ro Tokuda Rokuro kopiis ĉiujn numerojn de la revuo "Verda Lumo" konservitaj de japanaj esperantistoj kaj sendis la duplikatojn al Bakin. Pro tio Bakin kore dankis s-ron Tokudan Rokuron kaj aliajn japanajn esperantistojn. Li diris, ke la donacajo estas tre kara.

Bakin ĉiam ŝatas Esperanton. Kiam mi donis al li la lastan numeron de EPC, li tuj komencis legi mallaŭte kaj diris al sia filino Li Xiaolin, sidanta apud li kaj baldaŭ akompanonta lin al Francio, ke Esperanto estas simpla en prononco kaj facile lernebla. Tuj sekve li lernigis sian filinon prononci "Ĉinio" en Esperanto.

Li diris, ke Esperanto kiel internacia helpa lingvo estas lernenda. Precipe ĝi montris grandan oportunecon en la plimultiĝantaj internaciaj kontaktoj. Ĝi povas pliigi kompreniĝon kaj amikecon inter diverslandaj popoloj. Li lernis plurajn lingvojn, el kiuj Esperanto, laŭ lia opinio, estas la plej facile lernebla. Se oni forgesas ĝin pro kelkjara neuzado, oni povas rapide reposedi ĝin, per ioma relerno.

Liaj vortoj kuraĝigas min bone lerni Esperanton.

Tamen tiu intima kaj respektinda veterana verkisto, kiel multaj aliaj famaj ĉinaj verkistoj

kaj artistoj, estis persekutata de la "kvarpersona bando" antaŭ kelkaj jaroj. Li perdis personan liberecon kaj liberecon de verkado. Lin atakis ankoraŭ pli granda malfeliĉo: En somero de 1972, lia edzino, amikino dividanta kun li ĉiujn suferojn, tradukistino, simpla kaj honesta bonkorulino, mortis pro malsano kaj persekutado. Ekde tiam, Bakin multe pli malvigligis. Tamen li ne falis. Li decidis ekpreni plumon por esprimi sian malĝojon kaj indignon. En aŭtuno de 1974 li komencis traduki rememorojn de la rusa verkisto A. I. Herzen "Pasinteco kaj Pensoj".

En aŭtuno de 1976, la "kvarpersona bando" estis faligita. La maljuna verkisto finfine vidis printempon en aŭtuno sur la teritorio de Ĉinio. En majo de 1977 la shanghai-aj literaturaj kaj artaj rondoj okazigis kunvenon. Bakin kun granda ĝojo faris laŭinvite paroladon sub la titolo "La dua emancipiĝo". En tiuj gajaj tagoj li forgesis sian grandaĝecon, mem aĉetis ĵurnalojn surstrate kaj ĉeestis diversajn kunvenojn. Dum sia ĝoja renkontiĝo kun malnovaj amikoj li kuraĝigis sin kaj aliajn per vortoj: "Malgraŭ alta aĝo ni devas verki ankoraŭ pli multe." Li skribis al la fama dramverkisto Cao Yu, konsilante lin forlasi bagatelaĵojn kaj krei pli da dramoj: "Oferru ĉiujn trezorojn en via koro al la socialisma patrolando." Li tre zorgas junajn verkistojn, ĉiam detale ekzamenas iliajn verkojn kaj afable helpas ilin.

La maljuna verkisto sidanta antaŭ mi estis tre viglanima kaj serena. Li diris al mi, ke li havas planon por labori ĝis 80-jara aĝo. Li jam fintradukis la unuan volumon de "Pasinteco kaj Pensoj" kaj estas tradukanta la duan. Krome li estas preta verki romanon spegulantan travivaĵojn de maljunaj intelektuloj antaŭ kelkaj jaroj. Li planas verki ankaŭ eseojn, rememoraĵojn kaj novelojn. Por plenumi la suprediritan planon li ofte laboras ĝis profunda nokto.

Rigardante la arĝentajn harojn de la maljuna verkisto kaj la printempajn sunradiojn sur lia dorso, mi kvazaŭ vidus ankoraŭ flamanta lian Junecon. Por li tempo estas plej kara, kaj plie, aliaj vizitantoj atendis jam longe, tial mi ne volis plu ĝeni lin kaj adiaŭis lin.

Malgranda Heroino Nurgul

Ilustrita de ZHAO LONGYI

SUR la vasta stepo ĉe Mori-rivero en norda Xinjiang (Hingiang) de Ĉinio, 14-jara kazaĥa knabino Nurgul heroe oferis sian vivon en batalo kontraŭ neĝoŝtormo, por protekti kamelojn de la kolektivo.

Ŝia kortuŝa heroaĵo vaste diskoniĝis kiel legendo. Iuj diris, ke post la morto de Nurgul la kameloj savitaj de ŝi blekadis pro ĉagreno, kaj ili lekadis la neĝtavolon ŝin kovranta kaj malkovris ŝian flame ruĝan jupon, por ke ŝi estu trovita de la serĉantoj; aliaj diris, ke en la tago de la vivofero de Nurgul, aparte multe da neĝlotusoj sur Tianshan-montaro brile floris. . . Tiuj belaj legendoj esprimas la amon kaj karmemoron de la diversnacieca popolo de la stepo al la malgranda heroino.

Nurgul estis lernantino de la kvarjara klaso de la migranta elementa lernejo de Dashitoubrigado de la Mori-a Kazaĥa Aŭtonoma Gubernio. Matene de la 10-a de aprilo ĉijare, la familio de Nurgul ekagis por translokigi la prizorgatan kamelaron al la herbejo de Aĥlada je 20 kilometroj malproksime. En la komenco, ŝi kaj ŝiaj gepatroj iris antaŭe pelante la kamelojn ŝarĝitajn per la jurto kaj aliaj bezonaĵoj por vojgvidado, dum ŝia 10-jara frato Jerĝang kaj najbara knabo Hasm iris malantaŭe pelante 147 kamelojn. En la tagmezo, subite ekfuriozis ŝtormo ŝutante sablon, nigraj nuboj ruliĝis en la ĉielo, abrupte malaltiĝis la temperaturo, ekpluvis, hajlis kaj fine flirtadis grandaj neĝflokaj. Tia neĝoŝtormo estis malofta. Nurgul maltrankviliĝis pro sia frato kaj la najbara knabo Hasm kaj petis permeson retroiri por ilin helpi. Ŝia patro diris: "Mi iru!" Kaj Nurgul diris: "Panjo estas malsana, vi ne devas iri." Tion dirinte, ŝi turnis sian kamelon kaj galopis malantaŭen. Ĉiam pli furioziĝis la ŝtormo kaj la kamelaro jam deviis

de la vojlinio kaj galopis en la ventego. Nurgul trovis la kamelaron nur post duhora klopodado.

La flava kamelaro kuris sovaĝe kaj la du knaboj ploradis pro maltrankvilego. Post la alveno de Nurgul, ili fine sukcesis peli la kamelaron sur la vojjon al Aĥlada. Sed ili iris nur mallonge, kiam kvar surprizitaj junaj kameloj forlasis la gregon kaj kuris en la kontraŭa direkto. Nurgul diris al sia frato, ke li bone gardu la kamelaron, kaj ŝi mem postkuris la fuĝantojn, ligis ilin per ŝnuroj kaj ilin revenigis.

Sur la reira vojo la ventego atingis la dekan gradon kaj la kamelaro estis ne-retropelebla. Estis tre danĝere lasi ĝin kuradi laŭ la direkto de la vento. Nurgul diris al la frato tremanta pro frostoj: "Vi tuj reiru por alarmi, ke la kamelaro estas en danĝero." Jerĝang diris: "Vi reiru!" Nurgul diris: "Mi ne povas forlasi la kamelaron, alie ĝi mortos pro tiel malvarmega frostoj." La 16-jara Hasm diris tremante sur la dorso de kamelo: "Viaj vestoj estas tro maldikaj, vi reiru kaj mi gardu la kamelojn por vi." Nurgul diris: "Se mi vivos, ankaŭ la kameloj vivos, kaj se ili mortos, mi hontos vidi la aliajn!" Jerĝang timis, ke lia fratino mortos de frostoj kaj laŭte ploris. Nurgul aspektis malvarme, ŝi elektis maljunan obeeman kamelon, kiu bone konis la vojjon, kaj forsendis la frateton per ĝi.

La vento plifortiĝis, atingis la 11-an gradon kaj la temperaturo malaltiĝis ĝis 20 gradoj C sub nulo. La grandaj kameloj tremadis kaj la malgrandaj ne povis fari paŝojn. Kvar kamelidoj naskitaj nur antaŭ kelkaj tagoj preskaŭ mortis de frostoj. Neĝflokaj kirliĝis en la direkto en kiu Jerĝang iris, kaj jam ne eblis por Nurgul akiri la helpon de la patro kaj aliaj paŝistoj. Ŝi



prenis feltajn pecojn kaj vatitan litkovrilon de sur la dorso de la kamelo, sur kiu ŝi rajdis, kaj envolvis per ili tri kamelidojn. Sed ankoraŭ restis unu kamelido tremanta, ŝi do premis ĝin al sia sino kaj poste demetis sian jakon kaj per ĝi envolvis la besteton. Poste, ŝi kaj Hasm pelis la kamelaron al loko ŝirmata kontraŭ la ventego, ordonis ke ili kuŝigu kaj metis la kamelidojn sub la harozan kolon de iliaj patrinoj.

Noktiĝis, kaj la neĝoŝtormo, kiu jam daŭris pli ol 7 horojn, ankoraŭ furiozadis. La geknaboj kovrataj de neĝo interkonsiliĝis en la brutaro por trovi rimedon. Hasm diris: “La kameloj

kuŝiĝis, do ni foriru!” Sed Nurgul diris: “Mia patro ne alvenis, kadroj ne alvenis, kaj ni ne devas forlasi la kamelojn.” Hasm diris: “La kameloj kuris jam dekojn da kilometroj laŭ la vento, kaj ankaŭ la serĉantoj povas perdi la vojon. Se ni ne trovos helpantojn, estos danĝero por la kuŝantaj kameloj.” Nurgul trovis liajn vortojn pravaj. Ili do rajdis kontraŭ la direkto de la neĝoŝtormo. Tiel forte blovadis, ke ili ne povis malfermi la okulojn kaj baldaŭ ili perdis unu la alian.

Post pli-ol-du-hora penado Jerĝang jam venis al sia translokita hejmo kaj tuj post enpaŝo de la pordo li kriis por helpo al la kameloj, la fratino kaj Hasm. La patro de Nurgul, la pliaĝa frato de Hasm kaj kadroj de la paŝta brigado tuj forgalopis surĉevale al diversaj direktoj por serĉado. Nur en la sekvanta tagmezo iu kadro de la brigado rimarkis ion ruĝegan en la neĝo. Li descendis kaj konstatis ke ĝi estas ruĝa tolpeco. Ili tuj forigis la kovrantan neĝon kaj tiam aperis la rigida korpo de Nurgul, kiu ankoraŭ tenis la vipon sub sia brako.

Ne fore de la loko, kie Nurgul oferis sian vivon, troviĝis la sekuraj kameloj, kaj en la neĝo ĉirkaŭ la brutaro postrestis signoj de ŝiaj kaŭĉukplandumaj ŝuoj. Tio montris al ni, ke perdinte Hasm en la ventego, ŝi revenis sola al la kamelaro por ilin kalkuli, kaj ŝi finfine falis en la frua mateno. Mankis neniu el la 147 kameloj, kaj la 27 kamelidoj kviete kuŝis sin premante al la patrinoj. La kamelido volvita en la jako de Nurgul estis dolĉe suĉanta lakton de la patrino.


Nurgul oferis sian vivon por la intereso de la kolektivo. Dum sia mallonga vivo ŝi postlasis al la popolo multajn belajn memorojn. La paŝtistoj scias, ke ŝi estis saĝa knabino, tre disciplinema, kaj ŝia atingo en lernado ĉiam superis 95 poentojn. Ŝi vivis solidare kun la samlernejanoj, estis tre helpema al tiuj kiuj lernis malpli bone, kaj ŝi estis elektita estro de sia lernogrupo kaj eminenta juna pioniro. Ŝi loĝas pli malproksime de la lernejo ol aliaj, tamen ĉiutage ŝi venis la unua al la lernejo kaj purigis la klasĉambron kaj la nigran tabulon. Apud la lernejo loĝas maljunulo, kiu perdis la fingrojn de sia dekstra

mano. Si helpis lin ĉiutage per preno de akvo kaj lavado de vestoj en liberaj horoj.

En sia familio, Nurgul estis diligenta helpanto de siaj gepatroj. Ŝiaj gepatroj estas paŝtistoj kaj ilia nobla kvalito ami la kolektivon kaj ĝiajn brutojn kiel siajn infanojn donis neforgeseblan impreson al siaj infanoj. Nurgul vivadis inter ĉevaloj ĝis sia povoscio pri la mondaj aferoj kaj ŝi plej ŝatis ĉevalidojn. La brutidoj sub ŝia prizorgo estis brile grasaj. Post kiam ŝia patro ricevis la taskon de paŝtado de kameloj, ŝi ofte aperis en la stalo por doni furaĝon al la brutoj, forbalai fekaĵon kaj vespere fiks-ligi la kamelidojn.

Sur la paŝtejo Nurgul povis rekonii, kiuj herboj estas ŝatataj de la kameloj, bovoj kaj ĉevaloj kaj kiuj estas venenaj. Kiam ŝi estis 12-jara, ŝi komencis lerni injekti al brutoj kaj uzi medikamentojn, sciis higienajn postulojn pri stalo por akuŝado de brutidoj, povis fari desinfektadon al nodata umbilikŝnuro kaj pro tio estis tre ŝatata de la paŝtistoj.

Pro sia heroa sinofero Nurgul ricevis laŭdojn de la supera instanco. Ŝi estas honore titolita



kiel Bona Junulino de la Tipo de Lei Feng kaj estas rekonata de la loka organizo de la Komunisma Junulara Ligo kiel ĝia membro. Por memorigi ŝin, la paŝtistoj speciale alportis ŝtonojn kaj konstruis por ŝi tombon. La tomboŝtono portas la vortojn “Malgranda revolucia martirino Nurgul”. Ĉirkaŭ ŝia tombo oni plantis pli ol 300 arbojn. La loka popolo deziras, ke la malgranda heroino ĉiam ekzistos kun la kazaĥaj montoj kaj ŝia spirito ĉiam brilos kiel la neĝlotusoj sur Tianshan-montaro.

La solvoj de la enigmoj en ĉi numero: 1. animaloj: pego, lampiro, abelo, araneo; 2. objekto: termometro.

Bagateloj en la Vivo

KIU ESTAS ADRESATO?

Iun tagon, la Yangpu-a Filia Poŝtoŝicejo de Shanghai ricevis leteron el Usono, sur kies koverto skribiĝis: Al Sinjorino Li, kabano apud Longchang-strato ĉe la bordo de Huangpu-rivero najbare de la Yangpu-a Elektra Kompanio de Shanghai. Kien oni sendas la leteron, sen konkretaj adreso kaj nomo de la adresato?

Kunportante la leteron leterportisto Mao Zhaosheng vizitis la fabrikojn, butikojn de ĉiuj stratoj apud la Yangpu-a Elektra Kompanio kaj loĝkvartalon ĉe la bordo de Huangpu-rivero, sed li ne trovis la adresaton. Tamen li ne deprimiĝis kaj daŭrigis la serĉadon. Iufoje, iu emerita laboristo diris al li: "Post kiam la pajlaj kabanaj estis malkonstruitaj, parto de tiuj loĝantoj estis translokita en novajn etaĝdomojn kaj la alia parto al Linqing-strato." Laŭ la informo, li vizitis la lokojn kaj finfine trovis la sinjorinon Li ĉe Linqing-strato.

Antaŭ 30 jaroj tiu familio de Li migris de alia loko al Shanghai kaj starigis kabanon apud Huangpu-rivero. Poste pro la malfacila vivo, la plej aĝa filo kune kun sia plej juna frato sen-anonce forlasis la hejmon kaj de tiam estis neniu informo pri ili. Kiam Mao Zhaosheng portis la leteron al la familio, Sinjorino Li tute ne atendis, ke ĝi estas sendita de ŝia filo, kiu foriris antaŭ 30 jaroj, kaj emociiĝis ĝis larmoj.

En sia letero al la Yangpu-a Filia Poŝtoŝicejo, la adresanto de la letero el Usono diris: "Mi nomiĝas Yang Yunpeng, forlasis la hejmon kaj migris al Usono antaŭ 29 jaroj. En la lasta monato mi sendis leteron sen konkretaj adreso kaj nomo, sed ĝi estis sendita al mia familio. Por via klopodo en tio mi kore dankas vin."

BELA KIEL LA OKCIDENTA LAGO

En februaro ĉijare, la Hotelo por Ĉinaj Elmigrintoj de Hangzhou ricevis leteron de usona ĉino Tao Shaoming, kiu entuziasme laŭdas, ke la moralo de servistoj de la nomita hotelo estas bela kiel la Okcidenta Lago.

Tiel okazis la afero: Fininte sian ekskurson en Hangzhou Tao Shaoming kaj lia edzino veturis al Shanghai. Kaj nur tiam ili trovis, ke ili forgesis en la hotelo de Hangzhou sian juvelskatolon, en kiu estas smeraldo, agato, perloj, ora kolĉeno, ora leono, ronda horloĝo kun ora kovrilo kaj aliaj valorajoj. La geedzoj tre maltrankviliĝis pro tio.

Informiĝinte pri tio, kamaradoj de la Hotelo por Ĉinaj Elmigrintoj de Hangzhou ekagis kaj trovis ĝin en la ĉambro loĝita de la geedzoj. Por kiel eble plej rapide transdoni la juvelskatolon al la perdintoj, kamarado Zhang Ziyun de la serva sekcio de la hotelo tuj rapidis al Shanghai. Neatendite, kiam li atingis la hotelon loĝatan de la geedzoj, la perdintoj jam translokiĝis al alia loko antaŭ unu tago. En la sekvanta tago Zhang Ziyun sukcese trovis la perdintojn kaj donis la juvelskatolon al la mastro. Tao Shaoming kaj lia edzino tre kortuŝiĝis de tio. Premante la manojn de Zhang Ziyun, ili diris: "Antaŭe, ni neniam sukcesis trovi la objektojn perditajn dum vojaĝo. Sed en Ĉinio, post kiam ni perdis objekton, kiun oni transdonis al ni."

KIEL SAMFAMILIANOJ

La domo de Hou Guizhi, estrino de la Zhongbai-a Loĝantara Komitato de la urbo Qiqihar, estas najbare de tiu de georfoj Liu Lijuan kaj ŝiaj tri fratoj. Kvankam iliaj domoj

estas apartigitaj de unu muro tamen ili vivas intime kiel samfamilianoj.

La gepatroj de Liu Lijuan mortis unu post alia en 1967 kaj 1972. Tiam la plej aĝa Liu Lijuan nur estis 14-jara kaj la plej juna Liu Bo 8-jara. La ŝtato donis grandan prizorgon al ili kaj Hou Guizhi meminciate zorgis la gefratojn en vivo. Ŝi kudris, flikis kaj lavis veston por ili kiel patrino.

En festaj tagoj ŝi ĉiam invitis ilin al sia hejmo kaj regalis ilin per bongustaj manĝaĵoj. Hou Guizhi faris ĝiceton sur la komuna muro.

Nokte tra ĝi la geknaboj ofte povas aŭdi intimajn kaj zorgoplenajn voĉojn de Hou Guizhi.

Hou Guizhi ankaŭ edukas, ke ili diligente lernu kaj estu prudentaj kaj ĝentilaj. Nun Liu Lijuan ka ŝia plej aĝa frato jam fariĝis laboristoj en fabriko kaj ŝiaj du junaj fratoj vizitas respektive mezlernejon kaj elementan lernejon.

Nun, Hou Guizhi kaj ŝia edzo jam maljuniĝis. Liu Lijuan kaj ŝiaj tri fratoj do ofte helpas ilin en hejmaj laboroj kaj zorgas ilin kiel iliaj propraj gefiloj.

Korespondi Deziras

* Karl Sautter, Neuffener Str. 19, D-7435 Hulben, FR Germanio, 39-j., poŝtovicisto, dez. kor. kun ĉina esperantisto.

* Daniel Houguet, 13, rue du Pradonnais, 44350 Guerande, Francio, 36-j., kun ĉinaj esp-istoj pri jogo, foto, ktp.

* Josip Pleadin Joĉjo, B. Markaĉa 1, YU-43350 Durdevac, Jugoslavio, kun esp-istoj el tuta mondo pri diversaj temoj.

* Martti Telaranta, 54920 Taipalsaari K.K., Finnlando, kun ĉinaj esp-istoj.

* Luis Blasco Perez, Avda Sn Jose 122-5° F, Zaragoza, Hispanio, kun aziaj gesamideanoj.

* S-ino Ulla Bjork, Parkgatan 10, S-112 30 Stockholm, Svedio, 62-j.,

kun ĉinaj esp-istoj pri ĉina kulturo, speciale pri malnovaj herbaj medikamentoj.

* Sereŝ Imre, D. Dakovica 41, 21248 Lok, Jugoslavio, 18-j. studento de elektrotekniko, kun gejunuloj de tuta mondo, aparte kun ĉinaj.

* Juan Fernande, 21Rue Henri Matisse, 66000 Perpignan, Francio, kun ĉinaj esp-istoj.

* * *

NOVE RICEVITAJ LIBROJ DE STAFETO

Elektitaj fabeloj en versa traduko de S. Rublov aperis kiel No. 15 de Serio "Oriento-Okcidento" sub aŭspicio de UEA. 336 paĝoj kun pluraj bildoj.

Kara diablino Nova verko de Douglas P. Boatman, aŭtoro de La Nekonata Konato. 110 paĝoj.


Ĉu li bremsis sufiĉe? Nova krimromano originale verkita de Johán Valano en 128 paĝoj.

Esperantologiaj studoj de Wüster Kolektitaj verkoj de la pasinta eminenta esperantologio. La libro konsistas el 254 paĝoj editorita de Reinhard Haupenthal.



Xiamen

de DA RU



XIAMEN estas pitoreska marborda urbo de Fujian-provinco en sudorienta Ĉinio. Nun ĝi estas malfermita al eksterlandaj turistoj.

Antaŭe Xiamen estis insulo, kiun oni poste interligis kun la kontinento per du longaj digoĵoj kaj tiamaniere ŝanĝis ĝin en duoninsulon. Ĝi havas areon de 102 kvadrataj kilometroj kaj 230,000 loĝantojn.

La rigardindaj lokoj de Xiamen situas plejparte ĉirkaŭ la urbo, escepte de la fama Gulangyu, pri kiu ni aperigos apartan artikolon en la sekvanta numero. Tra la urbo fluas la rivero Lujiang kun belaj pejzaĝoj sur ambaŭ bordoj.


La urbo Xiamen situas ĉe la sudokcidenta angulo de la duoninsulo. Ĝiaj stratoj estas larĝaj kaj iom on-

daj. Okcidente de la Kultura Palaco de Xiamen, pluraj vojoj kondukas al la marbordo kaj aro post aro da etaĝdomoj formis stratojn de movplena komerca kvartalo.

Nemalproksime en oriento de la Kultura Palaco estas la Popola Placo. Kaj sudoriente de la placo estas la Tombejo de Martiroj, kiu prezentas la gloran tradicion de la Xiamen-a popolo en rezisto al la eksterlandaj invadantoj kaj enlandaj reakciaj regantoj. En la tombejo staras alta granita monumento de revoluciaj martiroj. Tiu tombejo kun multaj pinoj kaj cipresoj aspektas tre majesta. Pli fore de ĝi, la tero subite altiĝas kaj montriĝas montoj en la ĉirkaŭaĵo. Inter altaj rokegoj kaj verdajoj kun floroj, elrigardas blankaj temploj kaj kios-

koj. Nun konstruiĝas tie nova ĝardeno, nome la Botanika Ĝardeno de Wanshiyan, en kiu kreskas pli ol 3,500 specioj de tropikaj kaj subtropikaj plantoj el Sudorienta Azio, Aŭstralio, Novzelando, Afriko kaj Ameriko, inter kiuj estas pli ol 100 specioj de bambuoj, pli ol 400 specioj de krizantemoj kaj raraj specioj de narciso, orkideo kaj kamelio indigene kreskanta en Fujian-provinco. Starante sur alta loko de la ĝardeno oni povas vidi la tutan urbon dekoraciatan de belaj montoj kaj ĝian havenon apud la lazura maro sub la blua firmamento.

Transpasinte la Botanikan Ĝardenon, oni povas vidi antikvan templon ĉe la montpiedo. Ĝi estas Nanputuo-templo, konstruita en la mezo de la IX-a jarcento. La tem-



Monumento de Revoluciaj Martiroj de Xiamen

plo karakteriziĝas per pompeco kaj majesteco. Ĝia centra halo kaj la pavilono por konservado de sutroj estas ore brilaj.

Post ĉ. duonhora veturado per aŭto norden de la urbo, oni povas atingi la maran digon Jimei, kiu interligas Xiamen kun la kontinento. Antaŭ la konstruado de la digo, oni devis veturi per ŝipo por atingi tiun urbon. Nun sur la digo estas tri vojoj por trajno, aŭto kaj piediranto. La digo estas konstruita el granitaj pecoj. Se oni ĵetas rigardon eksteren dum veturado sur la digo, oni sentas sin moviĝanta kvazaŭ en

maro. Ĉe la transa fino de la digo vidiĝas altaj domoj, t.e. Jimei-lernejo fondita de patriota ĉina elmigrinto S-ro Chen Jiageng. Lia tombejo Aoyuan kuŝas ĉe la bordo. Ĉe Aoyuan oni povas rigardi poezian bildon de la maro kun veloj en la fono de la ĉielo kunfandiĝinta kun la maro.

En la orienta parto de la urbo troviĝas la fama Xiamen-universitato, en kiu iam instruadis la granda ĉina pensulo kaj verkisto S-ro Lusin. Nun en la universitato troviĝas la Memoriga Domo pri Lusin, en kiu montriĝas la verkoj skribi-

taj de li en la universitato, fotoj de S-ro Lusin kun progresemaj studentoj kaj lia dormoĉambro.


Antaŭ la Liberiĝo, Xiamen estis salttabulo por imperiistoj en ilia agresado al Ĉinio. Post la Opia Milito de 1840, Xiamen kaj aliaj kvar urboj estis perforte ŝanĝitaj en komercajn havenojn. Imperiistoj ĝin invadis unu sekvante alian kaj prenis Xiamen kiel sian fortikajon por rabi krudajn materialojn kaj dumpingi siajn varojn. En tiu tempo, sur la malgranda insulo Xiamen troviĝis centoj da magazenoj, bankoj, restoracioj, dancejoj kaj vetludejoj, cetere malmultaj metiejoj por faradi sapon, alumetojn, sojon ktp.

Nun Xiamen jam havas pli ol 300 diversajn industriajn entreprenojn, kiuj produktas tekstilaĵojn kaj aliajn varojn de malpeza industrio, maŝinojn, kemiaĵojn, elektronikajn instrumentojn ktp. Ĝiaj produktaĵoj kun apartaj lokaj karakterizaĵoj kiel ladmanĝaĵoj, teoj, porcelanaĵoj, vitraĵoj estas disvendataj en pli ol 70 landoj kaj regionoj.

Dank' al la diligenta konstruado de la popolo, Xiamen fariĝos urbo kun ankoraŭ pli multaj belaĵoj.



Baozhu-pagodo




Parto de Xiamen

Xiamen

Xiamen estas urbo sur marbordo de Fujian-provinco. Ĝi havas areon de 102 kvadrataj kilometroj, 230,000 loĝantojn kaj facilajn rimedojn de surtera kaj surakva trafikado. Post la finkonstruo kaj ekfunkcio de la Yingtian-Xiamen-a Fervojo, la industria kaj agrikultura produktado de Xiamen ricevis rapidegan disvolviĝon. Tie la klimato estas milda, neniam neĝas kaj ĉiam pompas floroj, tial la urbo fariĝis vizitinda loko por turistoj.

Nanputuo-templo





▲ Jimei-mezlernejo ▼






Xiamen-universitato



Halo memore al s-ro
Chen Jiangeng



Parto de la nova vilaĝo de revenintaj ĉinaj elmigrintoj



Xunjiang-rivero

SCIENCO NE KONAS LANDLIMON

— Pri la Ĉina Simpozio de Akupunkturo, Mokso kaj Akupunktura Anestezado


EN la komenco de junio, pli ol 300 reprezentantoj el diversaj lokoj de Ĉinio kaj pli ol 150 fremdlandaj medicinaj specialistoj el pli ol 30 landoj kaj regionoj kolektiĝis en Bejing (Pekino) por ĉeesti la simpozion. Ĝi estis granda scienca kunveno plena de amikeco, solidareco kaj scienca spirito.

Akupunkturo originis el Ĉinio. Frue en la sesa jarcento p.K. ĝi jam estis kondukita en Koreion kaj Japanion, kaj poste en Eŭropon en la deksepa jarcento. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio kuracistoj de multaj landoj venis unu post alia al Ĉinio por lerni akupunkturon, kio rapidigis ĝian disvastiĝon. Precipe la sukceso de Ĉinio en akupunktura anestezado vekis pli grandan atenton de fremdlandaj medicinaj rondoj al ĝi. Nun, la ĉina akupunkturo estas uzata en pli ol 50 landoj, inter kiuj ĉirkaŭ 30 landoj fondis sian akupunkturan asocion kaj iuj eĉ funkciigas specialan lernejon pri tiu terapio. Kaj nun aperadas eksterlande ĉ. 30 revuoj pri akupunkturo en la angla, franca, japana, germana, itala, hispana k. a. lingvoj.

La simpozio ricevis pli ol 1,000 disertatojn de ĉinaj medicinistoj kaj pli ol 50 de medicinistoj de aliaj landoj kaj regionoj, inter kiuj pli ol 200 disertatoj estis laŭtlegitaj en diversaj kunsidoj de la simpozio. Tiuj disertatoj spegulis novan sukceson de akupunkturo kaj akupunktura anestezo. Precipe dank' al kombino de fundamentaj teorioj de akupunkturo kaj akupunktura anestezo kun modernaj sciencoj kaj metodoj fare de ĉinaj kaj fremdlandaj sciencistoj, nova nivelo estis atingita en klinika uzado de tiu terapio kaj en studo pri ĝiaj principoj. La ĉinaj medicinistoj akiris rimarkindan sukceson en akupunktura kuracado de koronaria kormalsano, akuta disenterio kaj kolelitiazio, en akupunktura anestezo por toraka, krania kaj cezara operacioj kaj en ilia teoria esplorado. En la daŭro de la simpozio la ĉeestantoj rigardis operaciojn por pulmoektomio, malfermo de kranio kaj cezara operacio sub akupunktura anestezado.

En la simpozio Doktoro George Hatem ĝoje renkontiĝis kun la fame konata hinda Doktoro Bejoy Kumar Basu. Ili kune batalis por helpi Ĉinion en ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito en

Kunvenejo de la Ĉina Simpozio de Akupunkturo, Mokso kaj Akupunktura Anestezado





Ĉinaj antikvaj arĝentaj pingloj por akupunkturo multe interesas fremdlandajn amikojn.



Ĝoja renkontiĝo de ĉinaj kaj fremdlandaj medicinaj kolegoj

1938. Por disvastigi la ĉinan akupunkturon D-ro Basu dufoje venis al Ĉinio por lerni tiun arton post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Li iniciatis kaj fondis Hindan Akupunkturan Asocion, persone kuracis per tiu metodo kelkmil hindajn pacientojn, kulturis preskaŭ 100 hindajn akupunkturistojn kaj funkciigis akupunkturan klinikon en diversaj lokoj de Hindio. En tiu simpozio li legis sian disertajon “Akupunkturo en Hindio dum 20 jaroj”, en kiu li montris ke grandan bonon akupunkturo povas fari al

pacientoj de disvolviĝantaj landoj. Li diris: “La tradicia ĉina akupunkturo jam disvastiĝis en Hindio kaj pli kaj pli multaj hindoj volas akcepti tiun kuracmetodon.”

Profesoro Zhang Xiangtong, ĉefkomitatano de la Akademia Komitato de tiu simpozio kaj fame konata psikofiziologo de Ĉinio, iam vizitis Japanion, Svedion, Francion, Rumanion kaj Usonon kaj tie donis lekciojn kaj konatiĝis kun multaj fremdlandaj kuracistoj. Ĉifoje li renkon-

XIN HUA:

OPERACIOJ SUB AKUPUNKTURA ANESTEZO

EN junio, kiam okazis en Beijing la Ĉina Simpozio de Akupunkturo, Mokso kaj Akupunktura Anestezado, eksterlandaj medicinaj fakuloj rigardis operaciojn sub akupunktura anestezo faritajn de ĉinaj kuracistoj.

NASKIĜO DE BEBO

Je la kvara de junio, iuj fremdlandaj kuracistoj venis al la Beijing-a Obstetrika Hospitalo por rigardi cezaran operacion sub akupunktura anestezo.

La akuŝantino Xia Lihua estas 28-jara kaj laboras en iu maŝin-projekta institucio. Pro malarĝeco de la pelvo kaj la unuafoja akuŝado, aperis ĉe ŝi antaŭ la akuŝado komplika simptomo de toksigo, malalta hemo kaj edemo. Post interkon-

tigis kun iuj el ili kaj sentis apartan ĝojon. Post kiam li legis sian disertaĵon titolitan per "Reciproka Efiko en la Talamo de Enkondukaj Impulsoj el Akupunktura Punkto kaj Dolorloko", multaj fremdlandaj kolegoj gratulis lin pro tio. Profesoro Zhang Xiangtong montris sian intereson al la disertaĵo de Profesoro Sven A. Andersson de Goteborg-universitato de Svedio "Depremaj Efikoj de Akupunkturo al Talamaj kaj Kortikaj Respondoj Elvokitaj el Dentopulpaj Enkondukoj", tamen la lasta modeste diris, ke li nur pruvis principon elmetitan de Profesoro Zhang antaŭ multaj jaroj. Iuj el la fremdlandaj sciencistoj petis Profesoron Zhang verki artikolojn por sia medicina revuo aŭ kumuli membron de ĝia redakta komitato por plifortigi kunlaboron.

Scienco ne konas landlimon kaj la komuna afero havigis al la sciencistoj komunan lingvon kaj intiman kunlaboron. En la simpozio Prof. David Mayer de la Fiziologia Fakultato de la Medicina Instituto de Virginia Universitato de Usono faris, en la angla lingvo, raporton "Mekanismo de Anestezo". Juna docentino de la Shanghai-a Unua Medicina Instituto Zhang Anzhong ĝuste interpretis lian raporton en la ĉinan lingvon kaj pri tio ĉiuj ĉeestantaj ĉinaj kolegoj tre kontentis. Ĉar ankaŭ ŝi studas pri tiu temo kaj antaŭ ol Profesoro Mayer faris la

siliĝo kuracistoj decidis fari al ŝi operacion sub simpla, sed sekura kaj malmulte-hemoragia akupunktura anestezo.

Oni enpikis ses pinglojn en punktojn 2 cm. supre de la internaj flankoj de la maleoloj, 2 cm. malsupre de la eksteraj flankoj de la genuoj kaj ambaŭflanke de la tranĉa loko malsupre de umbiliko kaj poste konektis la pinglojn al aparato de akupunktura anestezo per elektraj fadenoj. La elektra ekscito de la pingloj tuj estigis regulan skuadon al la kruroj de la akuŝantino.

Post 15 minutoj komenciĝis la operacio. Post distranĉado de la abdomeno ĉesis la ekscito de la du surabdomenaj pingloj por ke la muskoloj malstreĉiĝu iom post iom, kaj daŭris la elektra ekscito de la aliaj pingloj. Pasis apenaŭ ok minu-

raporton, ŝi interŝanĝis opiniojn pri tiu temo kun li.

En iu akcepta kunveno, speciale invitita esploranto de la Ĉinmedicina Esplora Instituto, 75-jara akupunktura specialisto Zheng Zhuoren ĝoje renkontis sian amikon D-ron Joŝio Manaka, estron de Kitasato-Instituto de la Orienta Medicina Esplora Centro. De 1961 ili ofte korespondis por diskuti pri akupunkturo, ili donacis unu al la alia siajn disertaĵojn kaj interŝanĝis siajn fotojn, tamen ne povis intervidiĝi. Zheng Zhuoren diris, ke lia instruisto Cheng Dan-an komencis interŝanĝon de akupunkturaj spertoj kun japanaj sciencistoj jam en la dudekaj jaroj kaj iam veturis al Japanio por doni lekcionojn. Tio montris, ke Ĉinio havas longan historion de kontakto kun Japanio en medicino.

Estro de la Internacia Akupunktura Asocio Doktoro Jean Schatz ĉeestis la simpozion laŭ invito. Li diris en la simpozio, ke la ĉina tradicia medicino inkluzive de akupunkturo ne estas arkaika kaj ne plu uzebla, sed moderna kaj reala. Li diris ankaŭ: "Mi ĉiam opinias, ke ĝi estas unu el la plej gravaj riĉaĵoj de la homaro."

La tempodaŭro de la simpozio estis mallonga, tamen la sukcesoplena scienca interŝanĝo de en- kaj eksterlandaj sciencistoj donos grandan influon al studo de akupunkturo kaj akupunktura anestezado.

toj, kuracistoj elprenis knabinon pezan je 3,600 gramoj. Post kunkudrado de la utero kaj antaŭ kunigo de la abdomeno, la akupunkturistoj rekomencis la elektran eksciton de la du pingloj sur la abdomeno ĝis fino de la operacio.

Post la operacio, la akuŝantino ridetante diris al vizitantoj: "Mi sentas min bone. En la operacio mi estis ne streĉa kaj ne ŝvitis. Kunkudrado de la abdomeno min neforte doloris, sed kiam mi aŭdis ploron de la bebo, mi estis tre ĝoja kaj ne plu sentis doloron."

En la operacio la anestezo estis plenumita de du akupunkturistoj, el kiuj unu estis diplomita de la Beijing-a Flegista Lernejo en 1958 kaj la alia diplomita de higiena lernejo en 1964. La ĥirurgo Wu Chenghui estis diplomita de la Bei-

jing-a Medicina Instituto en 1959 kaj komencis fari cezaran operacion sub akupunktura anestezo en 1966.

Wu Chenghui diris: "La operacio iris glate, la sangpremo, pulso kaj spirado de la akuŝantino estis stabilaj, ŝia hemoragia kvanto ne superis 100 mililitrojn, t. e. triono de tiu de cezara operacio sub tutkorpa droga anestezo. Operacioj de tia sukceso okupas 75 % el la faritaj operacioj sub akupunktura anestezo en la hospitalo."

PULMOEKTOMIO SUB AKUPUNKTURA ANESTEZO PER UNU PINGLO

Kuracisto de la Beijing-a Tuberkuloza Instituto faris pulmoektomion sub akupunktura anestezo per unu pinglo. Post la operacio la paciento eksidis kaj diris al vizitantoj mansvingante: "Ĝis revido!"

"Estus okazaĵo vere nekredebla, se mi ne vidus tion propraokule," diris kuracisto D-ro Siew Kuang Chong de la Johore-Bahru-a Ĝenerala Hospitalo de Malajzio post rigardo de la operacio. Li rigardis la operacion, kune kun S-ro Sodipo de Nigerio, S-ro D. Henrioud de Svisio kaj S-ro J. Bland de Britio, kiuj venis partopreni en la simpozio kiel membroj de la Monda Higiena Organizo.

La paciento estis mezaĝa viro kaj nomiĝas Gao Qingju. Li estas oficisto de la Metalurgia Ministerio. Diagnozo montris, ke lia dekstra pulmo surhavas ciston kaj bezonas ektomion.

Prof. Xin Yuling faras pulmoektomion sub akupunktura anestezo.



Prof. Xin Yuling, estro de la Toraka Ĥirurgio de la instituto, faris la operacion, helpate de du kuracistoj kaj unu akupunktura anestezistino.

16 minutojn post la naŭa, la akupunkturistino enpikis pinglon en punkton 13 cm. supre de la ekstera flanko de la dekstra pojno de la paciento kaj rapide kaj senĉese turnis la pinglon. La ekrano de poligrafo montris, ke la pulso, spirado kaj sangpremo de la paciento estas normalaj.

36 minutojn post la naŭa komenciĝis la operacio. Tiutempe la akupunkturistino senĉese ŝanĝis pinglo-movan manieron, laŭ la operacia procedo kaj la vizaĝa esprimo de la paciento.

Kiam Prof. Xin estis faronta pulmoektomion, la akupunkturistino ordonis al la paciento fari abdomenan spiradon kaj enspiri iom da oksigeno. 27 minutojn post la deka, Prof. Xin Yuling elprenis el la torako la tranĉitan pulmo-ciston kun grandeco de pugno. La akupunkturistino malrapidigis la turnadon de la pinglo kaj diris al la paciento ke la cista parto de la pulmo jam estis elprenita. Je aŭdo de tio la paciento ridetis.

Kiam la kuracisto kunkudris la tranĉfendon, la akupunkturistino faris fortan turnadon de la pinglo. Je 5 minutoj post la dekunua finiĝis la operacio. Dum la tuta operacio la paciento estis en klara konscio. Helpate de flegistoj la paciento eksidis, surmetis vestojn kaj adiaŭis fremdlandajn amikojn mansvingante.

Post la operacio Sodipo ĝoje diris al Xin Yuling: "En 1975 mi rigardis ĉi tie pulmoektomion faritan de vi, tiam vi uzis plurajn pinglojn, sed hodiaŭ nur unu. La ĉifoja operacio ankoraŭ estas tre interesa por mi, kiel la antaŭa. Dum la operacio la paciento estis tre trankvila, kaj ni drogaj anestezistoj vere konvinkiĝis."

Ekde 1965 la instituto komencis apliki akupunkturan anestezon en operacio, sed tiam oni devis piki al la paciento en operacio 40 pinglojn, kiujn manipulis 4 akupunkturistoj. Post senĉesa esploro kaj plibonigo, oni nun uzas nur unu pinglon. En la pasintaj 14 jaroj la instituto aplikis akupunkturan anestezon al pli ol mil operacioj, kaj la sukcesaj procentoj atingis 97.2 %.

AKUPUNKTURA ANESTEZO EN ENCEFALA OPERACIO

Kuracistoj de Hindio, Japanio, Usono kaj Xianggang (Hongkong) rigardis kvar encefalajn operaciojn sub akupunktura anestezo en la Xuanwu-a Hospitalo de Beijing fame konata pro sia nerva ĥirurgio.

Unu el la operacioj tiris al si atenton de vizitantoj. La paciento estis 29-jara oficisto veninta el Heilongjiang-provinco. Li suferis de progressa vida malordigo en la pasinta jaro. Diagnozo montris, ke la malsano estis kaŭzita de pituitaria tumor, kiu premis la vidajn nervojn, kaj la kuracistoj decidis fortranĉi la tumoron.

Kuracisto de akupunktura anestezo pikis al li du pinglojn ambaŭflanke de la tranĉota loko sur la dekstra frunto kaj du pinglojn sur la piedoj. Post 20 minutoj komencis efiki la akupunktura anestezo. La ĥirurgo demandis al la paciento, kian senton li havis. "Nenia ĝeno," respondis la paciento. La ĥirurgo injektis en la tranĉan lokon normalan kuracsalon entenantan 1/200,000 de adrenalino por malpliigi hemoragion.


Kiam la kranio estis dissegita, la ĥirurgo uzis mikroskopon por klare vidi la pituitarian tumoron kaj la akupunkturisto demandis al la paciento pri lia sento, kaj tiu respondis: "Bone, mi sentis nur iom varme." Kaj li petis, ke la akupunkturisto malbutonu la supran parton de lia jako.

La ĥirurgo elprenis cistan tumoron kun diametro de 3 cm. kaj ĉerpis 5 mililitrojn da cista likvo. La operacio ne bezonas transfuzon. La ĥirurgo laŭeble konservis la pituitarion por reguligi la internan sekrecion.

La operacio daŭris du horojn kaj la paciento estis en klara konscio. Post la operacio la paciento diris, ke li povas vidi pli klare.

Se oni aplikos al li tutkorpan drogan anestezon, la paciento devos rekonsciĝi post pluraj horoj kaj cetere suferos reakcion de la anestezo.

Ankaŭ la aliaj tri operacioj estis sukcese faritaj. Oni elprenis fruntan loban tumoron por kamparano veninta el Hebei-provinco kaj meningan tumoron por virino suferanta de kormalsano kaj veninta el Henan-provinco, kaj kuracis adheran araneajsimilan ciston por elektristo




Cezara operacio sub akupunktura anestezo en la Beijing-a Obstetrika Hospitalo

veninta el Heilongjiang-provinco. Ĉiu operacio estis plenumita de du nervaj ĥirurgoj kaj unu akupunktura anestezisto. Ili ĉiuj estis kulturitaj de medicinaj institutoj de nova Ĉinio.

Respondeculo de la Xuanwu-a Hospitalo diris al fremdlandaj gastoj: La hospitalo komencis apliki akupunkturan anestezon en encefala operacio ekde novembro de 1965 kaj faris 1900 operaciojn, kiuj okupis 20 procentojn de la operacioj faritaj de la hospitalo. Neniu el la pacientoj mortis pro akupunktura anestezo. Laŭ la pasinta sperto kuracistoj difinis tri grupojn da korpunktoj de akupunktura anestezo por encefala operacio. La klinika praktiko montris, ke la sukcesa procento de ĉiu grupo atingis ĉ. 90 %.

REVIZITO AL PEKINO



S-ro Muramacu Jukijoŝi

ĜUSTE antaŭ kvin jaroj en aprilo, laŭ la oficiala invito de la Ĉina Esperanto-Ligo, mi vizitis Ĉinion por la unua fojo, kiel unu el la membroj de japana esperanto-delegacio. En tiu okazo mi renkontis kelkdekojn da esperantistoj en Pekino (Beijing), vizitis multajn lokojn kaj spertis diversajn aferojn, kiujn mi neniam travivis en Japanio. Unuvorte, malsameco inter Japanio kaj Ĉinio firme kaptis mian atenton. Kvankam dum longa tempo nia lando ricevis la kulturan influon de Ĉinio, tamen pro la diferenco de socia sistemo nuntempe japanoj ĝenerale ne detale scias pri la najbara lando. Pro manko de koncizaj informoj ankaŭ mi ne havis multe da kono pri la nuna Ĉinio. Tamen dank' al Esperanto kaj dank' al la invito de Radio Pekino mi havis okazon reviziti la ĉefurbon kaj mi povis multe informiĝi pri Ĉinio.

La unua impresado de ĉi tiu vizito estas tio, ke ne nur la aerodromo sed ankaŭ preskaŭ ĉiuj stratoj estas pli hele lumigitaj ol antaŭe, kvazaŭ simbolo de liberigita koro de la ĉina popolo. Fakte la politikaj devizoj nun ne tiom multe altiris min, kiom mi spertis en la antaŭa vizito. Vere malmultiĝis la elpendaĵoj de sloganoj, kiuj estis abundaj ĉie en la urbo antaŭ kvin jaroj.

En la 11-a de aprilo mi havis tre bonan okazon viziti stacion de Radio Pekino. Sendube mi estas la unua vizitanto oficiala el Japanio al la Esperanto-sekcio de Radio Pekino. S-ro Du Po, vicdirektoro de Radio Pekino, s-ro Tong Ke, vices-tro de la departemento de Sovetio kaj la orienteŭropaj landoj kaj ĉiuj laborantoj de la sekcio varmege bonvenigis min kaj montris al mi studiojn, kie la geanoncistoj laboras. Dum la intervidiĝo s-ro Du Po, vicdirektoro de la stacio,

interalie emfaze sciigis min, ke oni planas plimultigi sendhoron de la Esperanta programo. Ĝi estas vere surpriza novaĵo sed tre ĝojiga por ni ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo.

Mi estas ege kontenta, ke finfine mi atingis la fonton de la elsendejoj, kies programon mi bone aŭskultas preskaŭ ĉiufoje, kaj ĝis satiĝo mi rigardis kaj fotis ĉion, kion oni montris al mi.

En vespero de la sama tago du anoncistoj akompanis min por spekti Pekinan Operon kun kvar prezentaĵoj, kiuj multe plaĉis min. Inter tiuj prezentaĵoj estis du amarakontoj luditaj de ĉarmbelegaj aktorinoj en elegantaj kostumoj de malnova Ĉinio. Ŝajnas al mi, ke tiuj aktorinoj mem ludis la rolojn kun ĝojopleno. Kaj ankaŭ la spektantoj pekinaj kun gajaj mienoj plenĝuis kaj multe aplaudis la prezentaĵojn, kiuj antaŭe estis tute malpermesitaj pro nepolitikeco kaj burĝeco*, sed nun oni jam povas preskaŭ libere trakti eĉ amoferon inter gejunuloj, kio estas unu el la plej gravaj elementoj de la vivo ankaŭ en Ĉinio.

Antaŭtagmeze de la 12-a de aprilo la membroj de Esperanto-sekcio de Radio Pekino kondukis min al la redakcio de El Popola Ĉinio kaj tie mi estis varme bonvenigita kaj renkontis dekkelkajn gesamideanojn. Inter ili estis s-ro Tikos kaj s-ino Tan Hiuĝu. En la hotelo mi renkontis membrojn de Esperanto-sekcioj de Guozi Shudian kaj la Fremdlingva Eldonejo, kiujn mi bone konas jam de antaŭe kaj ni senĝene interŝanĝis opiniojn.

En la posttagmezo de la sama tago mi estis invitita al la hejmo de s-ro Kiu Gi, vices-tro de la Lingva Instituto de Pekino kaj tie renkontis

s-ron Jeh Ĉuntsien kaj s-ron Ĝang Ĉiĉeng. Post la gaja renkontiĝo kaj la intimaj interparoloj, tiuj tri respondeculoj de la Ĉina Esperanto-Ligo kondukis min al la Esperanta kurso de la instituto. La kurso, kiun mi vidis propraokule, okazas vespere du fojojn en semajno po du horojn kun dudek kursanoj kaj daŭras tri monatojn. En tiu kurso mi estis kore bonvenigita de ĉiuj kaj parolis diversajn aferojn pri la Esperanta movado. Post mia parolo sekvis s-ro Jeh Ĉuntsien, famekonata verkisto kaj tradukisto de la verkoj de Andersen kaj s-ro Ĉang Ĉiĉeng.

La remalfermo de politikaj rilatoj inter Ĉinio kaj Usono estis akceptata kun granda entuziasmo laŭ plimulto de la usona popolo. Atestaĵo de ĉi tio estas la nuntempa ekdeziro de nia popolo viziti vian. Esperantistoj longtempe utiligis ĉi tiun "mondan lingvon" por konstrui ponton super la fendo de interparolo inter ni kaj amikoj en aliaj landoj. La granda malfeliĉo estas ke la ideo de Esperanto kiel dua lingvo por alfronti la temon rekte malsukcesis. Ne estas la intenco de ĉi tiu artikolo analizi kialojn sed reŝerpi la eblecon ke ni havos renaskiĝon je ĉi tiu malfrua tempo.

Konsiderante la deziron de ambaŭ niaj popoloj esti inter si personajn rilatojn, ni devas pripensi la lingvan problemon. Unue la usona-angla lingvo estas tre malfacila lingvo por ellerni. La lerno de la ĉina lingvo ŝajnas preskaŭ malebla. Spite de ĉi tiuj malhelpoj estas multaj personoj de nia lando kiuj parolas, aŭ lernas, la ĉinan lingvon; kaj certe estas multaj personoj de via lando kiuj sukcese ellernis la anglan lingvon. Tamen, laŭ procento, povas esti preskaŭ neniom da komunikado inter niaj popoloj krom la utiligo de interpretisto.

Paralele kun tio ĉi okazas ankaŭ sammaniera kurso ĉe la Universitato de Pekino sub la gvido de s-ro Buldursson, islanda studento de la universitato.

Estas fakto, ke ne nur en Pekino sed ankaŭ en aliaj multaj urboj oni sinsekve malfermis E-kursojn. Nun en Ĉinio denove komenciĝis la brila leviĝo de nia lingvo Esperanto.

** Temas pri faro de la "kvarpersona bando", kiu kondamnis eminentajn literaturajn verkojn kiel verkojn de "nepolitikeco kaj burĝeco" kaj ilin malpermesis barbare.*

Fine, eble, multaj el niaj studentoj vizitos unu la alies landon kaj fariĝos kompetentaj je ambaŭ lingvoj. Dume, la Esperanta lingvo povas iĝi la ponto por rapida kaj facila komunikado inter ni ĉiuj, precipe tiuj el ni kiuj ne estas studentoj. La loĝistiko de instruado de popolamasoj ne estas mia fako, sed en niaj du eminentaj landoj ni certe povas atingi ĉi tiun celon.

Ni ĉiuj devas memori ke unu el la plej devigantaj kialoj ke Zamenhof kreis Esp-on estis ke li loĝis en loko kiu estis konkerita kaj rekonkerita. Ĉiu venkinta invadanto dekretis, "Parolu sole nian lingvon. Paroli iun alian estos perfido."


Zamenhof, kiu kredeble lernis la hebrean lingvon hejme, forlasis sian indiĝenan polan lingvon publike por paroli la rusan; pli malfrue forlasis tion por paroli la germanan, kaj tiom foje ripetis. Li rezonis — kaj ĉi tiu vera logiko certe ankoraŭ ekzistas nuntempe — ke se ordinara personoj povus interparoli per komuna lingvo, antaŭjuĝoj, suspektoj, kaj malamo sendube malpliĝus.

Ĉu ni, la ordinara popolo, povas konvinki niajn registarojn permesi provon por la bona ideo? Ni povas klopodi!

de Edwin H. Hammock, Usono

ESEO PRI

AMIKECO



En la Maro de Amikeco

de YAO YUN

— Pri revizito de Bakin
al Francio

EN majo de la kuranta jaro, nia fame konata verkisto Bakin vizitis Francion, kun la Ĉina Verkista Delegacio sub sia gvido kaj ricevis varman bonvenigon de la francaj literaturaj rondoj.


La nomo de Bakin estas konata de multaj francoj. Antaŭ duona jarcento li transveturis marojn kaj oceanon al Francio por studi. Tie li verkis sian unuan romanon "Pereo" kaj komencis sian literaturan karieron. Liaj tri romanoj "Familio", "Frosta Nokto" kaj "Ĝardeno por Ripozo" jam estas francigitaj kaj eldonitaj en tiu lando. Lin multaj prizorgas kaj estimas.

Nun, kiam arĝenthara Bakin devone surpaŝis la francan teron, forte emociiĝis lia koro kaj svarmis en li multaj pensoj. Lia revizito celis ne nur revidi malnovajn restaĵojn kaj amikojn, sed ankaŭ konstrui la novan ponton de amikeco kaj interkompreniĝo inter la kulturaj rondoj kaj la popoloj de Ĉinio kaj Francio.

S-ro Bakin venis al Francio unuafoje en la jaroj 1927-1928. En tiuj jaroj de granda revolucia ŝtormo iris en Ĉinio intensa batalo inter la revoluciaj kaj kontraŭrevoluciaj fortoj. Bakin diris: "Mi amas la patrolandon sed mi loĝis en fremda lando. Mi tre ĉagreniĝis, ke mi povis fari nenion por la patrujo." Ĝuste en tia cirkonstanco li komencis sian vivon de verkisto.

Ĉi-foje li vizitis la straton Tournefort en la Latina Kvartalo de Parizo, kie li loĝis en la pasinteco. Li rememoris, ke tiam li ĉiutage preterpasis la panteonon kaj iris al la parko Luksemburgo por legi kaj promeni tie. "En kiom da vesperoj de subtila pluvo mi staris antaŭ la statuo de Jean Jacques Rousseau kaj korverŝis ĉagrenon de ĉina junulo al tiu franca verkisto, kiu batalis por justeco. Ĉi-vespere, kiam aŭdiĝis obtuza sonorado de la sonorilo de Notre-Dame de Parizo, mi ne povis endormiĝi kaj ekprenis mian plumon por elverŝi miajn sen-

*La Ĉina Verkista Delegacio antaŭ hotelo en Parizo
iam loĝata de k-do Zhou Enlai en sia juneco*



tojn, amon kaj malamon.” Kaj tiamaniere komenciĝis lia verkado de la romano “Pereo”.

Poste S-ro Bakin transloĝiĝis al la urbeto Château-Thierry je ĉ. 100 kilometroj oriente de Parizo kaj tie studis la francan lingvon en mezlernejo unu jaron. Samtempe kun tio li daŭrigis sian verkadon. Tiu urbeto situas ĉe la bordo de Marnerivero kaj estas hejmloko de la fame konata fablisto La Fontaine. Li ĉiam tenas, en sia memoro, la belan urbeton kaj ĝian afablan kaj bonkoran popolon. Ĉifoje li vizitis sian patrinan lernejon en la urbeto. Akompanate de la direktorino li trarigardis la lernejon kaj tuj rekonis sian antaŭan loĝejon super la manĝohalo; kaj poste li venis al la postkorto kun foliriĉaj sovaĝaj kaŝtanarboj, kie li ofte promenadis. La urbestro okazigis akceptan kunvenon en la urbodomo por bonvenigi lin kaj donacis al li la urban blazonon.


Kiam li vizitis la lokojn kie li loĝis, lernis kaj verkis, li ofte menciis la influojn al li donitajn de J. J. Rousseau, Victor Hugo kaj E. Zola. Ĉu tio estas nur rememoro pri la pasinteco? Ne, li retrorigardis sian vivon, sian verkan vojon kaj la instruojn al li donitajn de tiuj pioniroj. Foje Bakin diris en Parizo: “Ami veron, ami justecon, ami la patrolandon, ami la popolon, ami vivon kaj ami ĉiujn belajojn de la mondo, jen estas ĉio, kion francaj verkistoj instruis al mi.”

Du fame konataj literaturaj organizadoj de Francio okazigis unu post alia akceptajn kunvenojn por Bakin. Ilin ĉeestis multaj francaj poetoj, prozistoj, romanistoj, literaturaj recenzistoj kaj tradukistoj. Iuj verkistoj speciale vizitis lin en la hotelo. Plejparte de la ĉinaj kaj francaj verkistoj unufoje intervidiĝis, tamen ili interparolis tre intime kaj harmonie, ĉar ili havis komunan lingvon. Ili parolis pri la literatura stato de la du landoj, do-

nacis unu al alia siajn verkojn kaj starigis novan amikecon inter si. En la akcepta kunveno aranĝita de la Plumo-klubo ĝia honora prezidanto Georges-Emmanuel Clancier faris paroladon, alte taksis la verkojn kaj spiriton de Bakin kaj laŭdis lin kiel defendanton de la subpremata kaj ekspluatata popolo. Li kondamnis la persekutadon fare de la “kvarpersona bando” al Bakin kaj esprimis sian ĝojon pro denova alveno de la printempo.

Neforgesebla estas la intervidiĝo kun verkisto Vercors en lia kampara loĝejo. Li estas fame konata verkisto partopreninta en la rezista movado dum la periodo de la Dua Mondmilito. Li vizitis Ĉinion dufoje en la jaroj 1953 kaj 1978. La gesinjoroj varme akceptis ĉinajn verkistojn. Bakin demandis ilin pri diversaj skoloj de la francaj literaturaj rondoj. Sinjorino Vercors montris al la ĉinaj amikoj la fotojn faritajn de ili dum sia vojaĝo en Ĉinio kaj la artikolojn verkitajn de

Bakin (maldekstre) antaŭ domo de la fama franca verkisto Vercors





Bakin antaŭ tombo de la fama franca verkisto Balzac

ŝi pri vizito al Ĉinio aperigitajn en gazetoj de Xianggang (Hong-kong).

Instruistoj kaj studentoj de la fakultatoj de la ĉina lingvo de pluraj francaj universitatoj tre ĝojis pro la vizito de Bakin kaj aliaj ĉinaj verkistoj. Ili okazigis por ili bonvenigajn kunvenojn kaj kunsidojn. En la bonveniga kunveno aranĝita de la Pariza Tria Universitato, juna franca studento deklamis en la ĉina lingvo verkojn de Bakin kaj aliaj tre serioze kaj sincere. Antaŭ ol okazis la akcepta kunveno de la Pa-

riza Oka Universitato, projekciigis la filmo "Familio", adaptaĵo de la samtitola romano de Bakin. Li mem ĉeestis la filmoludon kaj klarigis pri la fono de la romano, kio vekis grandan intereson ĉe la ĉeestantaj studentoj. En tiuj kunvenoj la instruistoj kaj studentoj kiuj sin okupis per la ĉina literaturo elmetis multajn demandojn al Bakin kaj aliaj ĉinaj verkistoj. Ili respondis ĉiujn demandojn, kaj per tio ricevis varmajn aplaŭdojn.

En Francio, Bakin estis ĉirkaŭata de homoj ĉie, kien li iris. La legan-

toj kun respekto tenis lian verkon en la mano kaj petis lian subskribon. Ĉiutage lin intervjuis raportistoj de ĵurnaloj, gazetoj, kaj radiaj kaj televidaj stacioj. Li impresis ilin kiel liaj verkoj per sincereco, entuziasmo kaj honesteco. Pro tio oni amas kaj estimas lin. Bakin diris, ke li "falas en la maron de amikeco".

Oni informiĝis, ke nun Bakin estas tradukanta la rememoron de rusa verkisto A. I. Herzen "Pasin-teco kaj Pensoj". Post kiam li atingis Parizon, pranepo de Herzen D-ro Noel Rist, kiu laboras en la Instituto Pasteur, vizitis lin en la hotelo kaj donacis al li la francan version de tiu verko kaj kopiojn de leteroj de Herzen kaj unu valoran folion de originalaĵo. Poste Bakin venis al la urbo Nice kaj respektive vizitis la tombon de tiu rusa verkisto sub akompano de alia pranepo de Herzen, emerita doktoro Andre Amphoux. Bakin diris: "Mi alportis unu koron por esprimi mian estimon al la granda pensulo kaj literaturisto." D-ro A. Amphoux tre emociiĝis kaj foje-refoje dankis lin.

En Liono francaj amikoj aranĝis bankedon por bonvenigi Bakin kaj la aliajn ĉinajn verkistojn. Dum la manĝado ili menciis la unuan strikon kaj insurekcion faritajn de la lionaj silko-ŝpinteksistoj en la historio de batalo de la monda proletaro. La ĉeestantaj francaj amikoj kantis tiaman revolucion kanton "Silko-ŝpinteksistoj". La emocia kantado altigis la amikecon inter la ĉina kaj franca popoloj.

Bakin pasigis tri streĉajn semajnojn en Francio. Kvankam li jam estas 75-jara, tamen dum la vizitado li neniam diris ke li laciĝis, kaj ĉiam restis vigla kaj paŝis firme. Li diris, ke li sentas sin pli juna.

GIĈETO

(Daŭrigo)

III

Poste, mi varme servis al la pasaĝeroj kiel antaŭe, kaj kiam mi estis libera mi ĉiam helpis gemaljunulojn el la pasaĝeroj aranĝi transvagoniĝon. Mi ne deziris laŭdojn, nek timis kritikojn, mi rigardis tion mia plenumenda laboro. Kaj dimanĉe, mi kaj malgranda Zhu speciale veturis al Hi'an por koni la dislokiĝon de la ĉefaj institucioj de la urbo kaj parkerigis ilin en liberaj horoj.

Tiutempe, en ĵurnaloj aperis ĉiutage strangaj artikoloj, kaj la diritaj personoj en nia stacio estis en energia aktivado. Ili ofte faris interparolon kun miaj kolegoj de la biletvendejo por doni premon al ili kaj provis timigi malgrandan Zhu kaj izoli min. Sed kontraŭe al ilia volo, la kolegoj en nia biletvendejo iom post iom proksimiĝis al ni kaj pliintimiĝis kun ni ol antaŭe.

En la Unua de Majo, mi ne vidis malgrandan Lu, nek vizitis lian hejmon, timante ke li ricevos pro mi pli fortan premon.

Kelkatempe mi tre sopiris lin, kaj mi devis reteni mian pasion laŭeble kaj mi laboris energie.

Iutage en la meza tagdeko de julio, mi plenumis noktan deĵoron. Pluvadis kaj en la biletvenda halo ne estis tiel multe da homoj kiel ordinare. Je duono post la 20-a, subite enkuris kamparano kun aĝo de pli ol 50 jaroj. Sin klinante al la giĉeto li demandis anhelante: "Kamaradino, per kiu vagonaro oni povas plej rapide atingi Xi'an?"

Vidante lin en tia maltrankvileco, mi diris: "La vagonaro n-ro 46, kiu startos je 3 minutoj post la 9-a."

Li enŝovis al mi monon por bileto kaj diris al homo post sia dorso: "Ne iru manĝi en restoracio, tuj venos la vagonaro."

Mi prenis por li bileton kaj lin demandis scivoleme, kial li tiel maltrankvilis. Mi informiĝis, ke ili estas komunumanoj de Wuxing-brigado en montregiono de Qinling, kaj iu intelekta junulino laboranta en ilia brigado toksiĝis dum ŝprucigado de insekticido kaj estis en vivdanĝero; ili startis en la lasta nokto kaj alportis ŝin senhalte al la stacio por ricevi urĝan helpon en Xi'an.

Mi rigardis la kvinopon: ĉiuj kun ŝvitoplana vizaĝo kaj nedirebla maltrankvilego. Mi tuj petis ke iu alia prizorgu mian giĉeton, rapidis al la deĵoranto, prenis de li la ŝlosilon kaj lasis ilin enporti la pacientinon al la kajo. Poste mi rekuris en la oficejon, prenis pluvmantelon kaj per ĝi kovris la brankardon. La komunumanoj, kiuj ŝajne tre malofte vojaĝis, min dankis foje kaj refoje.

Ŝajne la pacientino sur la brankardo vere estis grava kazo, ŝi deliradis kaj moviĝadis senkonscie. Kiam la aĝulo levis finon de la vatita kovrilo, ankaŭ mi ĵetis tien zorgan rigardon. Kaj la vidaĵo surprizis min. Iam vidita vizaĝo!" Mi atente pririgardis sed ne povis ĝin rekoni.

Antaŭ ol mi povis detale serĉi en mia memoro, la vagonaro n-ro 46 veturis en la stacion. Mi rapide aĉetis dekkelkajn kukojn kaj ilin donis al la komunumano dirante: "Onklo, vi nenion manĝis tuttage, prenu ilin por manĝi en vagono!" La komunumano prenis la kukojn kaj diris kun ŝanĝita voĉo pro ekscitiĝo: "Knabino, tiel bona vi estas, ni kamparanoj de Wuxing-brigado vin memoros por la tuta vivo!"

Kaj mi diris kortuŝite: "Onklo, tion ne diru. Pro la intelekta junulino, vi nenion manĝis dum

unu tuta tago kaj unu tuta nokto kaj tiel multe penis. Se io estas memorinda, estas vi kiujn mi devas ĉiam memori!”

La komunumano ankoraŭ volis ion diri, sed mi rimarkis ke eksonoris la signalo, kaj tuj puŝis lin sur la vagonan ŝtupetaron.

Kiam la vagonaro estis tuj startonta, mi subite ekmemoris, ke ĝi alvenos al Xi'an je 31 minutoj post la 11-a kaj la lasta aŭtobuso al la hospitalo celata de ili ekveturos je la 12-a. Ili neniam estis en Xi'an, se ili perdos tempon pro demandado pri la vojo, ili malfruiĝos. Kion fari? Tempo signifas vivon! Mi tuj prenis fontoplumon kaj desegnis skizan mapon pri la vojlinio. Montrante la mapon, mi klarigis al ili plurfoje, premante min al la fenestro, kaj trankviliĝis, nur post kiam ili bone komprenis min.

La vagonaro ekmoviĝis. Mi haste retropaŝis post la sekuran linion. Kiam ĝi jam estis tre malproksime, la komunumanoj ankoraŭ manŝvingadis al mi sin klinante el la fenestro.

Mi ne sciis kial, subite venis en mian kapon jena penso: Se malgranda Lu eksciis, ke la parkerigado pri la horar-tabeloj kaj vojlinioj povas tiel multe helpi en la hodiaŭa savado de homo en vivdanĝero, li certe ne estus min riproĉinta. Kvankam li estas obstina, li tamen estas prudenta. . . Sed kiel nun li estas?

Mi ne atendis, ke post unu semajno dekkelkaj reprezentantoj alsenditaj de la kamparanoj de Wuxing-brigado alportis laŭdan leteron al nia stacio tamburante kaj gongante. Multaj pasaĝeroj kolektiĝis ĉirkaŭe kaj manklakadis. La maljunulo eĉ ekscitiĝe rakontis al ili la okazintaĵon. Iu eldiris mian suferon de premado, kaj tio tuj kaŭzis seriozan sekvon: Multaj el la ĉeestantoj protestis kaj skribis kolektive dazibaŭ-on titolitan: “Estas Malpermesate Sufoki la Aktivecon de Kamaradino Malgranda Han en Servado al la Popolo”. Tiutage mi ne deĵoris, kaj en la sekvanta tago mi iris al la placo kaj vidis, ke la dazibaŭ-o estis publikigita surmure apud la laŭda letero, kaj sur ĝia malsupra marĝeno multaj pasaĝeroj faris notojn per plumo kaj globkrajonoj:

“Ni lernu de Kamaradino malgranda Han!”

“Kamaradino malgranda Han estas kora pri-zorganto de ni pasaĝeroj!”

“Dankojn al vi, Kamaradino malgranda Han, ke vi instruis nin kiel vivi kaj labori!”

Aliaj notoj rekte pikis la vundan punkton:

“Kiu persekutis Kamaradinon malgrandan Han, tiu oponas kontraŭ la instruo de Prezidanto Mao pri servado al la popolo!”

“Estas malpermesate al homoj kun kaŝita intenco inversigi pravon kaj malpravon kaj subpremi Kamaradinon malgrandan Han!”

.

Vi ne scias, ke mi larmadis dum la legado. Kun tia aĝo mi ankoraŭ neniam ricevis kuraĝigon kaj subtenon de tiel multe da homoj! Nur tiam mi vere sentis la feliĉon de servado al la popolo. Kaj mi diris al mi mem: “Nenion alian! Ĝis sekiĝo de la maroj kaj putriĝo de la ŝtonoj mi tiel faros dum la tuta vivo!”

La tempo flugadis, kaj baldaŭ jam estis la fino de aŭgusto. Iutage mi estis en deĵoro. Apenaŭ mi elvendis la biletojn por la vagonaro n-ro 46 kaj estis stariĝonta, kiam Sekretario Lei envenis kaj diris al mi, ke du pasaĝeroj nepre deziras vidi min.

Mi tre miris kaj elkuris. Estis la intelekta junulino kaj ŝia patro. Min vidinte, ili tuj kaptis miajn manojn kun varmega sento. Ŝia patro diris: “Kamaradino, mi vere ne scias kiel danki vin. Sen via helpo, Xiaolin certe jam perdus sian vivon!”

Mi prenis liajn vortojn nur kiel komplimenton kaj diris: “Vi estas tro ĝentila, onklo. Kiom mi povus helpi? Por danki vi devus vin turni al tiuj kamparanoj.”

“Ne, ni devas danki ĉiujn!” interrompis Xiaolin. “La doktoro diris tiutage, ke mia vivo saviĝis nur pro hazardo; se mi malfruiĝus je duona horo, mi estus jam nesavebla! Tion aŭdinte, la kamparanoj de nia brigado diris, ke estis vi kiu faris la plej grandan kontribuon. Se vi ne donus helpon, du horoj certe estus perditaj!”

Iliaj vortoj pli kaj pli embarasis min, kaj mi haste demandis al Xiaolin: “Ĉu vi tute resaniĝis?”

“Jes! Tute!” ŝi diris vigle, “fratino, mia patro diris en la vagono, ke descendinte de la vagonaro ni nepre unue dankos vin, antaŭ ol preni manĝon kaj trinkaĵon kaj iri hejmen.” Kaj ŝi kaptis mian manon kaj vokadis min per “fratino”. Mi rigardis ŝian ruĝan vizaĝon kaj trovis ĝin vere aminda. Mi pensis, ke estus tre bone havi tian fratineton!

Tiel pensante mi ekdiris pretervole: “Ŝajne mi jam vidis vin ie, kaj via vizaĝo estas tute ne fremda por mi.”

“Ĉu?” Ŝi atente rigardadis min, tiel senĝene, tiel naive. “Ŝajnas al mi, ke mi vin vidas unuafoje, kie do vi vidis min?”

Mi neniel povis rememori, mi kapskuis. Ni ankoraŭ iom interbabilis.

Mi devis denove vendadi biletojn.

Xiaolin diris al sia patro: “Bonvole hejmeniru unue. Mi atendu ĉi tie, ĝis la fratino finos sian deĵoron, kaj tiam ni kune iros hejmen.”

Tion aŭdinte, mi tuj malkonsilis tion al ŝi, sed ŝi neniel cedis. Povante fari nenion alian, mi devis unue iri vendadi biletojn.

Ĉar mi estas mallerta en societaj kontaktiĝoj, mi ĉiam sentas ĝeniĝon dum vizito al alies domo. Sed tiutage, ili estis tiel varmaj kaj sinceraj, ke estis neeble por mi rifuzi kaj mi devis iri kun ŝi. Xiaolin tre ĝojiĝis kaj ŝi babiladis kaj ridadis tenante mian manon.

Kiam ni atingis ilian domon, ŝia patrino jam atendis nin ĉe la pordo. Apenaŭ mi enpaŝis la pordon, ŝi tuj tiris min al la mezo de la ĉambro, min pririgardis palpante mian hararon kaj dirante laŭdajn kaj dankajn vortojn, ke mi tute embarasiĝis.

Mi ne scias, kiam Xiaolin eliris. Post momento ŝi enkuris, verŝajne kun iu malantaŭe, kiu tamen haltis ekster la pordo kaj neniel volis enpaŝi. Xiaolin ekmiris: “Envenu! Envenu! Vidu nian fratineton! Ha, vi, kiel okazas al vi hodiaŭ?”

Nur tiam la homo ekster la domo malrapideme enpaŝis. Mi ĵetis rigardon al li kaj stuporis. Divenu, kiu li estis. Malgranda Lu!

Malgranda Lu staris kun mallevita kapo, volis, tamen ne kuraĝis ekrigardi min. Lia vizaĝo kvazaŭ estis ruĝe kolorigita. Li balbutis: “Informiĝinte pri tio. . . mi jam pensis, ke. . . estis vi.”

Xiaolin kaj ŝiaj gepatroj estis tute mirigitaj. Xiaolin demandis al malgranda Lu: “Fraĉjo, fraĉjo, ĉu vi konas unu la alian?”

Anstataŭ ŝin respondi, malgranda Lu turnis sian vizaĝon al la patro kaj diris: “Estis ŝi, kiu promesis. . . nin viziti. . . je la Unua de Majo. . .”



Xiaolin svingis siajn brovojn, subite ŝi komprenis ĉion. Ŝi ekkriis pro ekscitiĝo, kuris al mi kaj min ĉirkaŭprenis: “Ho, fratino! Fratino! Bofranjo —” Ŝia voĉo haltis, kaj ŝi saltetadis klakigante la manojn: “Mi jam scias! Mi scias!”

Kaj tuj sekvis io eksterordinara — kiel ardiĝis la tuta familio! Tiel ĝojiĝis la patrino de malgranda Lu, ke ŝi ne povis fermi la ridantan buŝon; lia patro laŭte diris al lia patrino: “Kial tiel staradi? Tuj faru aranĝon por la gasto!”

Tiunokte, ni kunestis ĝis post la 10-a. Malgranda Lu akompanis min al la hejmo. Ni ne volis preni aŭtobuson kaj elektis por ni solecajn stratojn. Malgranda Lu diris: “Yunan, ĉu vi scias . . . ke dumlonge mi deziradis viziti vin, tamen mi timis. . .”

“Kion vi timis?” mi demandis.

“Mi timis, ke vi ignoras min. Yunan, ĉu vi ankoraŭ koleras. . . Mi volis vidi vin por diri al vi, ke mi eraris.”

Aŭskultante liajn vortojn, mi sentis ke bolas mia koro. “Malgranda Lu —” mi vokis lin, tamen povis diri nenion pli. Mi rigardis lin kaj

volis ekridi, tamen mi ne sciis kial malklariĝis miaj okuloj pro larmoj.

Tiunokte mi sentis grandan ĝojon kaj fortan ekscitiĝon!

Kiam ŝi tion rakontis, ŝia vizaĝo kovriĝis de ruĝa nuanco pro hontemo. Ŝiaj longaj okulharoj kliniĝis malsupren pro ekscitiĝo.

Ni absorbiĝis en aŭskultado kaj estis petontaj ŝin daŭrigi la rakonton, kiam ŝi subite ekkriis, rigardis sian horloĝon, stariĝis kaj diris: “Vidu, mi plene dronis en rakontado kaj preskaŭ forgesis la taskon!” Tion dirante ŝi kuris kun ruĝiĝinta vizaĝo al la ĝiĉeto.

Povante fari nenion alian, ni devis adiaŭi la lokon. Malgranda Han malfermis la ĝiĉeton kaj pardonpetis de ni kun rideto. Kaj poste ŝi sin turnis al la pasaĝeroj kun seriozeco kaj afableco. . .

Kiam ni atingis la pordon, mi ne scias kial, maljuna Shi kaj mi haltis samtempe. Kun estimo ni rigardadis ŝian ĝiĉeton por tre tre longa momento. . .

(Fino)



ENIGMOJ

L' unua arbon hakas sen hakilo,
la dua nokte uzas ne lanternon,
la tria uzas nur kudrilon ne fade-
non,
la kvara uzas ne kudrilon nur
fadenon.

(4 animaloj)

* * *

Rivero vertikale staras,
je vento ondojn ĝi ne faras,
pro varmo ĝia akv' sin levas,
pro frosto ĝia akvo falas.

(Objekto)

(La solvojn ser-
ĉu en ĉi numero.)



migita per suna energio anstataŭ gaso kaj akumulatoro.

La Shanghai-a Signallampa Fabriko fabrikis signallampon, kiu povas konservi sunenergion tage kaj produkti elektran lumon nokte. Ĝia lumo povas atingi 14 marmejlojn, tamen tiu de la malnova signallampo nur 6 marmejlojn. Eĉ pluva kaj malserena vetero daŭras unu monaton, tio ne malhelpas ĝian elektro-

provizon. Ankaŭ aliaj havenoj de Ĉinio estos ekipitaj per tia signallampo.

De 1974 fondiĝis en Shanghai nombro da institucioj kaj grupoj por esplori la teknikon por utiligi sunenergion. Iliaj esploraj objektoj inkluzivas elektroproduktadon per suna termoenergio, sunenergian akumulatoron, sunenergian akvohejtilon kaj sintezan utiligadon de sunenergio.

LA SHANGHAI-A ĜENERALA PETROL-KEMIA FABRIKO KOMENCIS PRODUKTADON


La fabriko estas la plej granda petrola kemiindustria kaj kemifibra fabriko de Ĉinio. Ĝi povas produkti ĉiujare 102,000 tunojn da sintezaj fibroj kaj 60,000 tunojn da altprema polietilena rezino. Ĝi produktas ankaŭ diversajn oleojn kaj kemiindustriajn materialojn.

La fabriko havas sume 18 kompletojn da produktaj ekipaĵoj, inter kiuj 9 estis importitaj el Japanio kaj FR. Germanio. La ceteraj 9 kompletoj kaj aliaj publikaj konstruaĵoj kaj helpaj ekipaĵoj estas konstruitaj de Ĉinio.


La konstruado de la fabriko komenciĝis en junio de 1972. La esplorado de la fabrika sidejo, projektado de la fabrikaj domoj kaj la tuta konstruado ĉiuj estas plenumitaj de nia lando.

SUNENERGIA SIGNALLAMPO

La signallampo de lumturoj en la Shanghai-a Haveno, la plej granda haveno de nia lando, nun estas lu-



La Dua Fabriko de la Shanghai-a Ĝenerala Petrolkemia Fabriko



Fabriko por trakti malpuran akvon sub la ĝenerala petrol-kemia fabriko

NOVA TERMOELEKTREJO EN KONSTRUADO

Lastatempe komenciĝis konstruado de la Jinzhou-a Elektrejo kun generatora kapacito de 1.2 milionoj da kilovatoj.

La nomita elektrejo sin trovas en antaŭurbo de Jinzhou en la okcidenta parto de Liaoning-provinco. Ĝia unuaperioda konstruado inkluzivas instaladon de tri altpremaj kaj alttermaj vaporturbinaj generatoroj, produktitaj de nia lando, kaj ĉiu el ili estas kun kapacito de 200,000 kilovatoj.

La konstruado de la elektrejo estas unu el la gravaj aranĝoj por disvolvi elektran industrion en la trijara naciekonomia reguligado de nia lando. Post sia finkonstruiĝo ĝi liveros grandan elektran povon al la industria kaj agrikultura produktado kaj popola vivo de nordorienta Ĉinio.

KONSTRUIĜOS EKSPOZICIA CENTRO EN BEIJING

Konforme al disvolviĝo de la eksteraj komercoj, Ĉinio konstruos en orienta antaŭurbo de Beijing grandan ekspozician centron por fremdlandaj ekspozicioj en Ĉinio. Nun la konstruado estas en preparado.

La ekspozicia centro apartenos al la Ĉina Komisiono por Disvolvi Internacian Komercon kaj okupos areon de pli ol 200,000 kvadrataj metroj kaj la ekspoziciaj haloj havos areon de ĉirkaŭ 50,000 kvadrataj metroj. Krome konstruiĝos dependaj konstruaĵoj servantaj al ekspozicio.

DOKUMENTA FILMO PRI PITORESKEJOJ KAJ HISTORIAJ LOKOJ

La unua dokumenta filmo pri mirindaj pejzaĝoj de nordokcidenta

Yunnan-provinco en sudokcidenta Ĉinio "Vojaĝo laŭ Yunnan-Tibeta Ŝoseo" estis varme akceptata de spektatoroj lastatempe.

La filmo prezentas belajn ambaŭflanke de la ŝoseo kun totala longeco de 800 kilometroj, ekzemple Cangshan-montaron je pli ol 4,000 metroj super la marnivelo, Erhailagon kun areo de 250 kvadrataj kilometroj kaj pompajn Yunnan-ajn kameliojn, kaj ankaŭ konigas vivon kaj kutimojn de baj-oj, naŝi-oj, tibetanoj kaj aliaj nacimalplimultoj loĝantaj ambaŭflanke de la ŝoseo kaj iliajn historiojn. Ĝi estas akompanata per popola muziko de Yunnan.

Ĝi estas unu el pli ol dek dokumentaj filmoj pri pitoreskejoj, faritaj de la Centra Studio de Novajaj kaj Dokumentaj Filmoj en la lasta duonjaro. La aliaj estas "Mistera Fonto de Changjiang (Jangzrivero)", "Ŝtona Kavarnaro de Yungang", "Potala-palaco" de Lhasa k.a.

POEMA MONUMENTO DE ĈEFMINISTRO ZHOU ENLAI FINKONSTRUITA EN JAPANIO

La monumento kun gravurita poemo de Ĉefministro Zhou Enlai verkita en la juneco "Araŝijama en la pluvado, Kioto, Japanio" estis finkonstruita en Kamejama-parko ĉe la piedo de Araŝijama-monto nordokcidente de Kioto. La sidejo de la memorŝtono estis elektita laŭ la medio prezentita en la poemo.

La monumento estis farita el fama ŝtono de Kioto kaj ĝia plastiko havas japanan nacian stilon. Sur la fronto de la nigre bruna memorŝtono estas gravurita la teksto de la poemo de Ĉefministro Zhou Enlai, manskribita de Liao Chengzhi, la estro de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio. Sur alia ŝtonplato estas inkrustitaj vortoj en la japana lingvo:

"Por memori la Japana-Ĉinan Pacan kaj Amikecan Traktaton subskribitan en oktobro de 1978 kaj por esprimi amikecon de la urbanoj de Kioto de generacio al generacio al la ĉina popolo, oni konstruis poemŝtonon de la granda Ĉefministro Zhou Enlai, en tiu fontoprofunda loko."

Deng Yingchao, edzino de Ĉefministro Zhou Enlai kaj vicprezidentino de la Konstanta Komitato de la Popola Kongreso de Ĉinio, ĉeestis la inaŭguron de la monumento.

DIZELA TREJNA KURSO FUNKCIIGITA DE UNO

Organizo de UN pri industria disvolvo kaj la ĉina registaro lastatempe funkciigis kune trejnan kurson pri uzo kaj riparo de dizeloj en la Shanghai-a Dizela Fabriko.

En ĝi partoprenis inĝenieroj kaj teknikistoj el Afganio, Egiptio, Jordano, Liberio, Nigerio, Pakistano, Sirio kaj Tanzanio. La kurso ĉefe donis praktikajn sciojn bezonatajn de disvolviĝantaj landoj, kombinante teorion kun praktiko en la instruado. Ĉiuj kursanoj bone trapasis la ekzamenon kaj ricevis diplomon. Respondeculo de tiu organizo de UN diris, ke konsiderante la sukceson de la kurso li proponos funkciigi plue tiajn kursojn en Ĉinio.

TEKNIKA INTERŜANĜO PRI SILKRAŬPA KULTURO INTER ĈINIO KAJ JAPANIO

La Dua Japana Amikeca Delegacio de Silkraŭpaj Kulturistoj donacis 2,000 morusarbidojn al Yunlongbrigado de Haining-gubernio de Zhejiang-provinco.

Silkraŭpa kulturado en Ĉinio havas historion de 4,700 jaroj. Frue en fino de la dua jarcento nia tek-

niko pri silkraŭpa kulturo jam estis enkondukita al Japanio. Kaj poste la japana tekniko pri silkraŭpa kulturado estis senĉese enkondukita al Ĉinio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio plimultiĝis la teknika interŝanĝo kaj kunlaboro en tiu flanko inter Ĉinio kaj Japanio.

La japanaj gastoj vizitis la morusarban ĝardenon, kokon-elbobenejon kaj silkraŭpajn kulturajn ĉambrojn de la brigado, interŝanĝis sperton kun la komunumanoj. La japanaj amikoj ankaŭ prezentis al la lastaj sian novan teknikon pri uzado de maŝinoj kaj elektraĵoj tondiloj en plukado de morusfolioj kaj donacis al la brigado libron pri preventado kaj kuracado de malsanoj de morusarboj. Ĉe adiaŭo la brigado donacis al la japanaj gastoj silkraŭpajn kokonojn de bona specio elkulturita en la lastaj du jaroj. Kaj ankaŭ la lastaj donis al la brigado donacajojn faritan el blankaj kokonoj.

MONDA REKORDO DE HALTERLEVO

La ĉina halterleva sportisto Wu Shude rompis mondan rekordon de dumana ŝiro de knaboj kun pezkatetorio 52 per 107.5 kilogramoj en la Kvina Monda kaj Eŭropa Knaba Halterleva Konkurso okazinta en la 16-a de junio en Debrecen de Hungario.

VOLANAJ KONKURSOJ EN HANGZHOU


De la 10-a ĝis la 20-a de junio la Unua Volana Mondpokala Konkurso kaj la Dua Monda Volana Ĉampioneca Konkurso de la Monda Volana Federacio okazis en la ĉina pitoreska urbo Hangzhou. Ilin ĉeestis sportistoj el Bengladeŝ, Birmo, la Demokratia Kamboĝo, la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, Kenjo, Xianggang (Hongkong), Nepalo, Niĝerio, Pakistano, la Filipinoj, Singaporo, Srilankao, Tajlando, Zambio kaj Ĉinio. La mondpokala konkurso inkluzivis viran kaj virinan teamajn konkursojn kaj la ĉampioneca konkurso inkluzivis 5

disciplinojn. La ĉina sportisto Han Jian gajnis la ĉampionecon de vira unuopa konkurso kaj la ĉina sportistino Han Aiping gajnis la ĉampionecon de virina unuopa konkurso, la ĉinaj sportistoj Sun Zhi-an kaj Yao Ximing gajnis la ĉampionecon de vira duopa konkurso, la tajlandaj sportistinoj Patama Siririro kaj Suleporn Juttariyakul gajnis la ĉampionecon de virina duopa konkurso kaj Xianggang-aj sportistoj Wu Junsheng kaj Chen Nianci gajnis la ĉampionecon de miksa duopa konkurso. Post la konkursado la honora prezidanto de la Monda Volana Federacio Huo Yingdong kaj aliaj donis premiajn pokalojn kaj medalojn al la sportistoj.

Diverslandaj volanistoj vizitas teĝardenon de Hangzhou.



La Dua Monda Volana Ĉampioneca Konkurso




HU ZHAO:

La Cervo Turnis

Sian Kapon

(POEMO)



— LEGENDO DE LI-NACIECO*

*Kurado ĝin kondukis al la fino de la vojo
De la insulo tie estis jam ekstrema parto
Pafarkon sian la ĉasisto streĉis plene
Subite l' cervo sian kapon turnis por rigardo*

*L' okuloj belaj plenis je ĉagreno
Kaj la ĉasiston kaj la sagon pririgardis
Hezitis nur sekunde la ĉasisto
La cervo jam sur monton saltis*

*Ĝin la ĉasisto postkuradis
Kaj al malgranda ebenaj' alvenis
Jen bela junulino tie
Kun kap' klinita plugi penis*

*Siaj okuloj mildis kiel cervo
La jupo ŝia je brodaĵoj plenis
Forgesis la ĉasisto la ĉasaĵon
Kaj la pafarkon kaj la sagon li malprenis*

*Ĉiutagmeze de post tiu tago
Serĉadis cervon la ĉasist' surmonte
Ĝis li kaj l' junulino geedziĝis
Ankaŭ bienon sian havis fonde*

*En la monato tria, la geedzoj kantis kaj dancadis
Ĉe l' lok', kie la cervo l' kapon turnis, kun amaso
L' edzino fuĝis lerte, l' edzo postkuradis
Imite al la vera cervo-ĉaso*

*Li kaptis, jen finfine li ŝin kaptis
Tremis la cerv' en la ĉasista sino
Li kvazaŭ tenus sian kor-feliĉon
Brakumis firme la edzinon . . .*

*La tempo fluis jar-post-jare
Legendo bela iras tradicie
Kaj ĉiujare en la Tria de l' Monato Tria
La gejunuloj kantas, dancas tie*

*Per la plej belaj dancoj ili
Prezentas la legendan cerv-akiron
Per la plej belaj kantoj ili
Esprimas sian kor-deziron*

*Kiel ajn multe pasos tempo
Sed jeno ĉiam restos vera:
Al la junuloj plej kuraĝaj
Ja apartenas amo plej miela*

* La li-oj estas nacimalplimulto de Ĉinio koncentre loĝanta en la centrasuda parto de Hainan-insulo de suda Ĉinio.



Ilustrita de YIN FENGGE

“Edeno de Birdoj”


Post ses-kilometra veturado per aŭtobuso suden de la gubernia urbo Xinhui de Guangdong-provinco, oni vidas antaŭ si vastan lagon kun “oazeto” kvazaŭ flosanta en la akvo. Sur la insuleto kreskas grandega banjano kun multaj trunkoj, vaste etendiĝantaj branĉoj kaj densaj folioj, kiuj solide kovras la unu-hektaran insuleton. Sur ĝi libere vivas diversaspecaj birdoj. En la pasinteco ĝi portis la nomon “Terbenko de Birdoj” aŭ “Insuleto de Gruoj”. Antaŭ 30 jaroj ĉina esperantisto kaj fama verkisto Bakin vizitis ĝin kaj verkis eseon titolitan per “Edeno de Birdoj”. Ekde tiam vaste cirkulas tiu titolo kaj la origina nomo estas forgesita.

Matene aroj kaj aroj da blankaj kaj helbrunaj gruoj disflugas de la insuleto por ĉasi manĝaĵojn kaj vespere revenas al ĝi; dume aroj kaj aroj da grizaj gruoj agas tute male. Vespere ili komencas sian noktan vagadon kaj je la tagiĝo revenas al siaj nestoj. Tiu alterna flugado super la arbego kaj ilia klakado prezentas miraklan spektaklon.

Oni diras, ke en la erao Jingtai (1450 — 1456 p.K.) de Ming-dinastio, tieaj kamparanoj fosis kanalon por irigacii la kampojn ĉiujare suferantajn de sekegeco. Sed poste katastrofo daŭre atakis ilin. La lokaj tiranoj diris, ke la fosado de la kanalo atencis la Drako-dion kaj venigis la fatalon. Ili ordonis, ke la kamparanoj dronigu boatojn

plenŝarĝitajn per tero por ŝtopi la kanalon kaj metu teron sur ĝin por formi terbenkon. Fininte la laboron, iu kamparano forgesis sian banjanan vekton sur ĝi, kiu poste burĝonis kaj kreskis en ĉielkrapan-tan arbon. La lokanoj nomis ĝin Dia Arbo. Ĉiufoje, kiam oni preterveturis ĝin per boato, ili aldonis al ĝi manplendon da tero, tiel ke la arbo kreskis pli prospere. Ĝiaj pendantaj branĉoj enradikiĝis en la teron kaj fariĝis dikaj trunkoj unu apud alia; kaj tiuj trunkoj elkreskigis novajn branĉojn, el kiuj kreskis pendantaj radikoj, kiuj poste fariĝis novaj trunkoj. Tiu arbo tiel kreskadas jaron post jaro kaj tiel kovras la tutan insuleton. Oni ne scias, de kiu jaro alflugis blankaj, helbrunaj kaj grizaj gruoj kaj fikse loĝiĝis tie. Ili tie generas idojn kaj nun tiu loko fariĝis vera “Edeno de Birdoj”.

Edeno de Birdoj



Har-brodajoj

Har-brodaĵo, alinomata “nigra brodaĵo”, estas unu el la tradiciaj metiartaĵoj de Ĉinio. Tia brodaĵo estas farita sur silkŝtofo per haroj de la homo. La linioj de tiu brodaĵo estas pli klaraj kaj fortaj, la brodmaniero estas pli delikata ol tiu de la silkbrodaĵo. La koloroj estas okulfrapaj, sed ne pompaj, belaj sed ne luksaj. Ĝi karakteriziĝas per ori-

Har-brodaĵo “Ok Feoj Celebras Naskiĝotagon”



ginaleco, eleganteco, sendekoloriĝo, ne-putriĝemo kaj facilekonservebleco.

La ĉina harbroda arto havas longan historion. Frue en la dinastioj Tang kaj Song, kiam prosperis budhismo, adeptinoj brodis budhajn ikonojn per siaj haroj por esprimi sian piecon. Poste tiu metiarto populariĝis jaron post jaro. Laŭdire, la plej frua harbrodaĵo de nia lando — la portreto de Dongfang Shuo de Song-dinastio — nun estas konservata en la Londona Muzeo. Iu japana kolektanto hektografis albumon “Famaj Pentraĵoj de la Dinastioj Tang, Song, Yuan kaj Ming”, en kiu troviĝas harbrodaĵoj de du pentraĵoj faritaj de Xia Mingyuan de Ming-dinastio “Tengwang-turo”¹ kaj “La Turo de Flava Gruo”².

La haroj de homo ne putriĝas kaj ĉiam restas brilkoloraj. Ili estas iom malmolaj kaj glitaj, kaj facile rompiĝas dum brodado. Pro ilia unukoloreco la harbroda arto estis limigita en sia disvolviĝo kaj preskaŭ velkis en la pasinteco.


En la jaro 1958, instigate de la principo “cent floroj kune floru” elmetita de Prezidanto Mao Zedong por disvolvi kulturon kaj arton, laboristinoj de la Esplora Institucio de la Suzhou-aj Specialaj Metiartaĵoj heredis la tradician arton kaj brodis per haroj portreton de la ĉina antikva poeto “Qu Yuan” (340 — 278 a. K.), kiu poste estis ekspoziciata en la Tutlanda Agrikultura Ekspozicio. Ekde tiam tiu antikva

arto vekis intereson ĉe homoj. En la jaro 1969, sub gvido de veteranaj harbrodistoj de Suzhou la Dongtai-a Fabriko de Metiartaĵoj elkulturis nombron da harbrodistinoj. Heredante la tradiciajn metodojn kaj kreinte la novajn ili faris brodaĵojn “Chang-e Flugas al la Luno”, “Feino Disŝutas Florojn” kaj aliajn de diversaj floroj kaj birdoj. Harbrodaĵoj estis multfoje eksponitaj en la Guangzhou-a Foiro kaj konkure aĉetataj de eksterlandaj komercistoj.

La harbrodaĵoj de la nomita fabriko havas sian apartan stilon. Ekzemple, en la pasinteco ĝi uzis harojn nur nigrajn, sed nun ankaŭ flavajn, grizajn, okrajn, helflavajn kaj blankajn, sume kelkdek kolorojn. Tiuj diverskoloraj haroj estas kolektitaj en la regionoj de nacimallimultoj. Perskaŭ ĉiuj brodaĵoj estas faritaj per haroj kun naturaj koloroj, escepte de ruĝe kolorigitaj homharoj en brodado de la lipoj de virino kaj sigelilo. Samtempe kun tio ili faris kuraĝan renovigon al la broda tekniko, por ke la unukoloraj harbrodaĵoj havu artan stilon kun klaraj kaj pluraj koloroj kaj ver-similaj figuroj. Nun la brodaĵoj impresas homojn artisme per firmeco, beleco kaj eleganta neteco.

1. Tengwang-turo estis konstruita en Tang-dinastio (618-907 p.K.) kaj plurfoje riparita, kaj poste forbruligita. Ĝia malnova sidejo sin trovis ĉe la bordo de Ganjiang-rivero, Nanchang, Jiangxi-provinco.

2. La Turo de Flava Gruo laŭdire estis konstruita en la jaro 223 p. K. kaj multfoje rekonstruita de postaj dinastioj. Ĝia malnova sidejo situas sur la monto Serpento, Wuhan, Hubei-provinco.



NIA

ABELBREDADO

Jugoslava leganto Kaplan kaj aliaj skribis al nia redakcio esperante, ke ni donu informon pri abelbredado en Ĉinio. Por tio ni prezentas jene la artikolon "Nia Abelbredado".

La Red.

LA abelbreda afero de Ĉinio estas entreprenata tiel en varma Guangdong-provinco en sudo kiel en malvarma Heilongjiang-provinco en nordo, kaj eĉ sur la Tibeta Altebenaĵo — "la Monda Firsto", kie antaŭe oni neniam bredis abelojn.

Je la jarfino de 1978, la nombro de esamenoj jam atingis pli ol 4 milionojn en la tuta lando, t. e. 8-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. En la pasinta jaro la kvanto de mielo aĉetita de la ŝtato plimultiĝis 20-oble kompare kun tiu de 1949. La nombro de esamenoj de Ĉinio okupas la trian lokon en la mondo laŭvice post Sovetunio kaj Usono.

Ĉinio kun modera klimato, vastega teritorio kaj riĉaj nektarfontoj havas la historion de pli ol 2,000 jaroj en bredado de abeloj. Mielo de Ĉinio estas tre bonvena al la internacia merkato pro ĝiaj bona kvalito, multa speco kaj riĉa nutro. Ekzemple, tilia mielo de Heilongjiang-provinco, liĉia kaj longana mieloj de la provincoj Guangdong kaj Fujian estas tre nutraj kaj tonikaj kaj havas bonan odoron kaj sufiĉan dolĉon.

La unua bazloko de esplorado pri abelbredado estas fondita de la Abelbreda Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj en Guyuan-subregiono de la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono. Dank' al la klopodado de fakuloj la pli ol 200 ŝtataj kaj kolektivaj abelbredejoj de la tuta subregiono akiris, en la lastaj jaroj, pli kaj pli bonajn rikoltojn.

Post multjara kulturado nun jam formiĝis la bonrasa speco — Ĉina Abelo (*Apis cerana cerana*) adaptiĝema al diversaj naturaj kondiĉoj de suda kaj norda Ĉinio. Ĝi superas la aliajn ĉinajn abelojn per diligenta kolektado de nektaro, akra flarsenso, sentimeco de varmo kaj malvarmo kaj rezistemo kontraŭ malsanoj. Dank' al plana selektado kaj kulturado de bonrasa abelino kaj scienca bredado en abelkesto kun moveblaj kadroj, la Ĉina Abelo ne estas tiel malgranda kaj esamenigema kiel antaŭe.

Krome Ĉinio enkondukis italajn abelojn kaj Kaniolan-abelojn kiuj ankaŭ montris bonan kvaliton en produktado post longa bredado.


Speco hibridigita per la Nordorienta Nigra Abelo de Ĉinio kiel la

patro, kiu multe kolektas nektaron kaj eltenas malvarmon, kaj la Itala Abelo kiel la patrino havas fortan vivipovon kaj altan produktivon de ovoj. Fari hibridigon al abeloj estas efika metodo por pliproduktado. En iuj regionoj jam fondiĝis generejoj de originaj kaj bonrasaj specoj de abeloj por laŭplane bredi kaj disvastigi la hibridigitajn specojn.

Abelinoj devas plenumi pezan taskon de kolektado de nektaro. Ilia granda malamiko — parazita insekto *Varroa jacobsoni* nun jam estas bridita.

Fekundigi plantojn per abeloj estas efika metodo por altigi produktokvanton kaj kvaliton de agrikulturaj plantoj. Eksperimentoj de fekundigo per abeloj en la provinco Zhejiang (Ĝegiang) kaj aliaj lokoj montris, ke la produktokvanto de kolzo plialtiĝis per 37%, ĝia oledona procento per 10%; la produktokvanto de kotono per 10%; kaj tiuj de poligono kaj ĝia faruno per 30% respektive; kaj ankaŭ riĉaj rikoltoj de pomo, piro, persiko, liĉio, mandarino kaj aliaj fruktoj estis akiritaj.

Mielo, abelvakso, abelreĝina gelato, abela veneno k. a. estas vaste



NOVAJ ESPERANTAJ

LIBROJ

DE ĈINIO

LA REVOLUCIO DE LA TAJPING-A ĈIELA REGNO

(11Es-1372-p)

La Revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno estis grandioza kampanara revolucio, kiu okazis en la mezo de la dekaŭa jarcento. Ĝi daŭris dekelkajn jarojn kaj ĝia revolucia forto devastiĝis tra preskaŭ la tuta Ĉinio. Ĝi estas la unua revolucia tajdo en la moderna ĉina historio

Tiu revolucio forte batis la feŭdan regantaron de Qing-dinastio kaj estis farita senceda batalo kontraŭ la krulega agresa forto de la eksterlanda kapitalismo. Ĝi manifestis la neflekseblecon de la ĉina popolo, kiu neniam voluntas submetiĝi al imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Ĝiaj brilaj atingoj kaj historiaj kontribuoj estos por ĉiam memorindaj por la posteuloj.

La libro prezentas la okaziĝon, disvolviĝon de la revolucio kaj batalan spiriton de la herooj de la Tajping-a Ĉiela Regno.

134 paĝoj

13 × 18.3 cm.

Prezo: £0.80

US\$1.50

FF7.00

DM4.80

Kolektado de abelregina gelato



uzataj en farmacio, industrio kaj manĝaĵpreparado de Ĉinio. Abelterapia specialisto Fang Zhu diris, ke mielo havas bonan kuracefikon al malsanoj de hepato, kardiovaskulo, anemio, stomako, neŭrasteno kaj ftizo. Abeloj estas amiko de la homoj por sano, unu esameno da abeloj estas kvazaŭ farmacia fabriketo.

Tamen Ĉinio estas ankoraŭ postginta en la nombro de esamenoj por ĉiu loĝanto kaj en meĥanika bredo.

Ĉi-jare en la regiono Ningxia (Ninghia) kaj la provincoj Shaanxi (Ŝenhi), Gansu, Sichuan (Siĉuan), Guangdong kaj Hubei (Hubei) fondiĝis abelbredaj bazlokoj, tio signifas ke abelbreda afero en Ĉinio disvolviĝos pluapase.

En julio establiĝis en Beijing la Ĉina Abelbreda Asocio kaj ĝia prezidanto estas Ma Defeng.

Verkita de HUA WEN

LA REFORMA MOVADO DE 1898

(11Es-1371-p)

La movado estas burĝa reformisma movado. Ĝi okazis en la tempo, kiam akriĝis la kontraŭdiroj inter la feŭdismo kaj la popolamasoj de Ĉinio kaj precipe inter la imperiismo kaj la ĉina nacio.

La burĝaj reformistoj intencis, sin apogante sur la aŭtokrateco de la imperiestro kaj klopodoj de malmultaj homoj, efektiviĝi novan politikon de supre al malsupre. Tiu vojo apartigita de la popolo estis kondukata al fatala fiasko. Tamen, la movado dekomence aperis kiel kontraŭulo de la malnovaĵoj kaj levis politikan ŝtormon en la tuta lando. Kvankam tia batalo estis tre malgranda, tamen ĝi donis certan influon al la tiama ideologia sfero.

Tiu libro koncize prezentas al legantoj la estiĝon, disvolviĝon kaj fiaskon de tiu politika reforma movado.

100 paĝoj 13 × 18.3 cm.
Prezo: £0.45 US\$0.90 FF4.20 DM2.90

JIHETUAN-MOVADO

(11Es-1374-p)

La mondsdua Jihetuan-movado, kiu okazis en Ĉinio en 1900, estis movado kontraŭimperiisma kaj patriota kun kamparanoj kiel la ĉefa forto. Ĝi estis kaŭzita de la ĉiam pliiganta imperiisma agreso kaj la senprecedenca nacia krizo.

Kvankam Jihetuan-movado estis strangolita de la imperiismo kaj la registaro de Qing-dinastio, tamen, ĝi, kiel ĉiuj aliaj revoluciaj movadoj de la ĉina popolo dum la lastaj 100 jaroj, manifestis la neflekseblecon de la ĉina popolo kaj peze batis la agresantojn.

La libro prezentas tiun grandiozan revolucian movadon, prikantas la revolucian heroismon de Jihetuan-batalantoj kaj malkaŝis la damnindajn krimojn de la agresantoj kontraŭ la ĉina popolo.

92 paĝoj 13 × 18.3 cm.
Prezo: £0.45 US\$0.90 FF4.20 DM2.90

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Beijing, Ĉinio

Generala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj),

P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe la peranto aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto.



Supera Toniko

KUN MARKO "PINO"

FORTEGA ABELREGÎNA GELATO

Indiko:

Fortikigo de korpo

Beligo kaj tenado de la haŭtkoloro

Pakado:

30 kapsuloj por ĉiu botelo

unu kapsulo por ĉiu tago

Kun plej multa enteno de natura

abelregîna gelato kaj ginsengo

Eksportanto:

Tianjin-a Branĉo de Lokaj Produktaĵoj de la Ĉina Stata Importa kaj Eksporta Kompanio de Lokaj Produktaĵoj kaj Animalaj Flankproduktaĵoj

Adreso: 33, Harbin-strato, Tianjin

Telegrafa adreso: "DRUGS" Tianjin



KOREKTOJ POR N-RO 8

1. P. 10, dekstra kolono, la 6-a linio de malsupre: aldonu, "iuj agentaj bankoj kaj iliaj filioj en Xianggang" post la vorto "Xiang-gang".

2. P. 16, dekstra kolono, la 15-a linio de malsupre: la vorto "dekla-mis" estu legata "proklamis".

3. P. 26, dekstra kolono, la 13-a linio de malsupre: la vorto "kreskaĵoj" estu legata "kreskeĵoj".


4. Interŝanĝu la klarigojn "Klo-zoneaĵo 'Pava Kruĉo'" kaj "Vaksaj fruktoj" en la lasta serio de bildoj en nigro kaj blanko.

5. La nomo "Harada Ikno" sur la bildpaĝo "Fotoj pri naturaj bel-lajoj faritaj de E-istoj" estu legata "Harada Ikuo".

6. P. 1, maldekstra kolono: la nomo Huang Yongyu estu legata Jiang Tiefeng.

La Riparejo de Antikvaj Objektoj de la Imperiestra Palaco

Wang Qinghua, kiu laboris pli ol 50 jarojn,
estas en riparado de ekrano de Qing-dinastio.



Pentraĵo-riparejo





Pentristino Feng Zhonglian imite pentras fame konatan pentraĵon de Song-dinastio (960-1279).

Riparado de diversaj antikvaj horloĝoj faritaj en- kaj eksterlande





Laboristoj de la bronza grupo reproduktas kvadratan bronzan kruĉon kun supre staranta grupo de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.). En la foto maldekstre estas la originalo kaj dekstre la reproduktajo.



Veterana laboristo instruas al junaj laboristoj teknikon de pentraĵo-riparado.



Riparita bronza feniksa lampo de la Okcidenta Han-dinastio antaŭ pli ol 2,000 jaroj (en la supra maldekstra foto estas la elterigitaj fragmentoj de la lampo)



Garnado de miniatura pejzaĝo de Qing-dinastio (1644-1911)



FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

de ĉino YAN SHENG



▼ Floroj ▲





Silkrubanda danco

ĈINAJ

DANCOJ




Kanto de Fiŝistinoj


Popola danco de Anhui



1



4.



2




PERLO

(Legendo pri la Okcidenta Lago)

- 1 Antaŭ longe, oriente de la rivero estis Jada Drako kun skvamoj jadosimilaj, kiu libere nagis en la lazura akvo.
- 2 En la floraj arbaroj okcidente de la rivero estis Ora Fenikso kun ore brilaj plumoj, kiu libere flugis en la aero.
- 3 Iu-tage, la Drako kaj Fenikso venis al fea insulo kaj trovis brilan ŝtonon.
- 4 La Drako kaj Fenikso kune poluradis la ŝtonon kaj fine turnis ĝin en raran perlon.

3



5



6



8



- 5 Kaj en la brilo de la perlo, pompe floras diversaj floroj kaj riĉaj rikoltoj estis ricevitaj unu post alia.
- 6 Diino Wang Mu en la ĉielo ekvidis la brilan perlon, avidis je la trezoro kaj tuj ekhavis fiintencan.
- 7 Wang Mu sendis ĉielajn armeanojn por forŝteli la perlon de la Drako kaj Fenikso dum ilia dormo en profunda nokto.
- 8 La Drako kaj Fenikso tre ĉagreniĝis pro perdo de la perlo. La Drako traserĉis la kavernojn en la riverfundo, sed ne trovis la perlon.
- 9 La Ora Fenikso traserĉis la feajn montojn kaj florarbarojn, sed ne trovis la perlon.
- 10 Dume, Wang Mu fiere montris la perlon sur ora telero ĉe festeno de feoj kaj la ĉiela palaco fariĝis ankoraŭ pli pompa en la brilo de la perlo.

9



7




10




11




14



12



15



13



11 La feoj admiris kun etendita kapo kaj aplaudadis.

12 La Drako kaj Fenikso rimarkis la brilon kaj flugis en la ĉielan palacon por repreni la perlon. Diino Wang Mu diris kolere: "Ĉiuj trezoroj apartenas al mi kaj vi tute ne rajtas ĝin posedi!"

13 La Drako kaj Fenikso diris indigne: "La ĉielo kaj la tero ne povas produkti tian trezoron, ĝi estas kreita de nia laboro."

14 La Drako kaj Fenikso sin jetis al la ora telero. Wang Mu kovris la perlon per siaj manoj. Kaj dum ilia luktado por akiri la perlon, la trezoro falis en nubojn.

15 La perlo fariĝis sur la tero la bela Okcidenta Lago kaj la Drako kaj Fenikso fariĝis du montoj tiel nomataj kaj akompanadas la lagon kun blujaj ondoj.